

esperanto

FEBRUARO 1990 • 83-A JARO • N-RO 1010 (2)

ISSN 0014-0635



- La movado reviviĝas en libera Rumanio
- Ekde septembro, studi interlingvistikon koresponde!
- Unu libro, du recenzoj: ĉu bonas *La bona lingvo*?

La limoj de la lernejo

Enhavo

- 21 Instruado: Ĉu la lerneja instruado malhelpas alproprigi Esperanton? (Ernő Csiszár)
- 23 Helpu al esperantistoj en Rumanio!
- 24 Instruado: Cele al ekonomia kaj profesia bazo (Edward Symoens)
Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI: Rezultoj
- 25 Instruado: En Ĉinio mankas la "daŭriga metodo"
(Esperanto-Asocio de Orient-Ĉinia Normala Universitato)
Universitatoj: Interlingvistiko per korespondado
- 26 Interŝanĝoj: Arto kunigas koreajn kaj japanajn junulojn (EPA)
Terminologio: Necesas lerni de ekstere (Ankica Jagnjić)
- 27 Koresponda Servo Mondskala: Okcidenta Eŭropo postlamas
la mondon (Robert Llorens)
Kulturo: Pri dokumentoj kaj detaloj (Amador Díaz)
- 28 Informado 2: lom da psikologio (Ivo Durwael)
Esperantologio: Atentinda prezento (Ulrich Lins)
- 29 Esplorvojaĝo tra Azio: Ĉu vi aliĝos al la azia evoluo? (Joachim Werdin)
- 30 Landa agado: Semoj en la sudo (Philippe Chavignon)
Germana E-Asocio lanĉas ĝemeladon kun Zairio
- 31 Reagoj: Ĝusta orientado (Jukka S.); Preta por prunto (Geoffrey King);
Vortoza vulkano (Aldo de'Giorgi); Kion fari? (Olga Kerzjuk); Seksismo
en liriko (Willem Verloren van Themaat); Pri la membrokampanjo
(Hilmar Ilton Santana Ferreira)
- 32 Recenzoj: *La bona lingvo* de Claude Piron (Baldur Ragnarsson,
J.-F. Farjon de Lagatinerie); *La Esperantisto* (Sergej Kuznecov)
- 36 Nekrologoj; Akiko Ŭusink-Nagata (1936-1990)
- 37 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
Foliume (pripresaĵaj raportetoj)
- 38 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 40 Oficiala informilo

Vi trovos,

preter paĝoj da instruistoj, vojaĝantoj, komisiitoj kaj aliaj disportantoj de la verda flago, ankaŭ ampleksan recenzo-rubrikon. "Ampleksan?" mi jam aŭdas vin krei. "Temas nur pri du libroj!" Nu, tiuj kiuj ŝatas kondensitajn enhavtabelojn efektive malkontentos. Tamen tiujn paĝojn, kiel ĉiujn ceterajn, mi ne konsideras nur rimedo por vendi kelkajn librojn aŭ varbi manplenon da donacoj. Recenzoj estas ankaŭ artikoloj, foje inter la plej signifaj. Kaj kiam temas, kiel ĉi-numere, pri aferoj centraj en niaj ekzisto kaj agado, mi fordonas volonte la katedron. Legu, do, pri *La bona lingvo* sur paĝoj 32-34 – kaj poste legu la libron mem! Se tio ŝajnas neebla ĉe la bindita kolekto de *La Esperantisto* pro ĝia ĉieltuŝa prezo, pripensu tamen la plej proksiman urban aŭ universitatan bibliotekon: jen nepraĵo por ĝia (inter)lingvistika fako. Kaj ne hontu proponi ĝin! Ni kaj nia historio jam havas signifon por la mondo, kion ankaŭ pri temas la sekvaj paĝoj.

La kovrilo: Limoj, limoj... Ni frontas ilin, sed ankaŭ la strukturoj de la socio mem ne adekvatas al sia tasko. La unuaj kvin paĝoj prezentas respondojn al nia propra edukokrizo. (Foto: Unesko / A. Jonquière)

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj.

Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 48,75; US\$ 23; GM 43; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1540, 1/2 p. 850, 1/4 p. 470, 1/8 p. 260, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Eksterakvri laŭ anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: +3110 436 17 51.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (01) 542 0302; telefakso (01) 380 7408.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdarska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarckenstr. 150, D-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Osmo Buller, Suksitie 4 B 15, SF-93400 Taivalkoski, Finnlando; tel. (988) 51 003; telefakso (988) 51 681.

Estrarano (informado): s-ro Ivo

Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2520 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 12999, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. (02) 646 5413; telefakso (02) 275 0633.

Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Štimec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. (041) 42 92 51.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendahl, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47; telefakso (1) 43 66 09 92.

Instruado:

Ĉu la lerneja instruado malhelpas alproprigi Esperanton?

Ordinaraj lernejoj ne povas plenumi siajn devoj: amasegoj da junuloj forgesas la lingvon tie lernitan, tre rapide; ilia lingvoscio neniam fariĝas aplikbla. De tempo al tempo ardiĝas la disputo inter koncernuloj: ĉu pli gravas parolkapablo ol ekposedo de gramatikaj reguloj? Kion sciu cetere lernantoj: ĉu legi, skribi, kompreni aŭ paroli? Samtempe ĉiuj ĉi celoj ne estas atingeblaj, sekve la lerneja lingvaĵo fariĝas krude kripligita. Eĉ por la idoj de la elita tavolo restas ne pli ol du elirvojoj: alproprigi fremdan lingvon helpe de la familio – do ekster la lernejoj – aŭ ekposedi ĝin en specialaj edukejoj, fonditaj precipe je profito de privilegiitoj. En la unua kazo oni instruigas la infanojn ekde frua aĝo private eksterlande, en fremdlingva medio. En pluraj landoj funkcias kelkaj lernejoj – en Hungario ĵus estis fonditaj dulingvaj gimnazioj – kie la aplikado de la akirita lingvoscio okazas surloke: duono de la studobjektoj estas instruata fremdalingve.

Estus nefacile vicigi nur la skolojn de la metodikistoj, kiuj celis pli efike instrui fremdajn lingvojn al infanaj amasoj. La tendenco mem tamen estas klara: antaŭe la instruado de la gramatika sistemo havis primaran lokon, nun, male, oni paroligas la infanojn, celante transigon el arbitre elektita minimuma lingvaĵo al nivelo jam aplikbla.

La limoj de lerneja instruado

Esperantistaj pedagogoj bedaŭrinde blinde sekvadis ĉiujn metodikajn modojn; dumvoje ili ŝanĝis la veran celon je pseŭda. Anstataŭ helpi la infanojn iel ekkoni Esperanton, oni batalegas por enlerneja egalrajtigo de Esperanto, strebadas por formi el ĝi ordinaran studobjekton: estu ĝi tia, kia estas iu ajn alia, kiu povu malgajigi, enuigi, suferigi la infanojn dum plena jardeko, se ne pli longe, same kiel en kelkaj orientaj landoj la rusa.

Tiun ĉi celadon spegulas tezoj pravigitaj kelkfoje ankaŭ de UEA, same la seniluziigaj faktoj: ekzistas landoj kun organizita grupo de pedagogoj *sen lingvokursoj*. Por instrua laboro la pedagogoj ne havas tempon, ilia energio elĉerpiĝas dum farado de strategiaj planoj, kompilado de petletero, per

kiuj ili senlace bombardadas ministeriojn, aŭtoritatulojn. Same malagrablas alia sperto: en landoj, kie oni sukcesis oficialigi Esperanton, rimarkinde malkreskas la interesiĝo al ĝi. Post la “oficialigo” oni povas “produkti” malpli da esperantistaj infanoj ol eblis antaŭe en malpli konvenaj juraj cirkonstancoj.

En lernejoj, t.e. inter burokratismaj kondiĉoj, fariĝus el Esperanto ordinara lerneja lingvaĵo, absolute simila al aliaj, do preskaŭ plene senutila.

Tradicia celo de la movado montriĝis mistrafa, laŭ ĉi tiu artikolo el la organo de ILEI, Internacia pedagogia revuo. La argumentoj de Ernő Csiszár meritas diskuton. Kiel aliigi nian strategion, se Esperanto en lernejoj fariĝas “ordinara lerneja lingvaĵo, absolute simila al aliaj, do preskaŭ plene senutila”?

Prezenti ian ĝeneralan formon de lingvaĵo lerneja, kiun oni instruas, respektive alproprigas (ofte ambaŭ nur teorie) – tio estas nesolvebla problemo. La unuecon certigus la lernoplanoj, lernolibroj, la unueca agado de pedagogoj. De lando al lando tiuj faktoroj multe malsimilas. Plej okulfrapaj estas la diferencoj, kiuj devenas el ideologiaj-politikaj pripensoj. Plurfoje eblas pruvi, ke la lernolibroj mem antaŭ ĉio celas fortigi politikajn idealojn, t.e. doni falsajn bildojn pri la reala vivo, kaj ne gravas, ke dum la uzado de tiuj ĉi libroj la lingvo-alpropriga procezo fariĝas kvazaŭ akcesora.

En certaj landoj la instruplanoj por ĉiuj fremdaj lingvoj pli-malpli estas la samaj, ankaŭ la lernolibroj multe similas, ties aŭtoroj verkas laŭ anticipe ricevita postuloj, direktivoj. Sed en la praktiko inter la lernejoj mem tamen estas enormaj diferencoj, kiujn kaŭzas precipe financaj kaj laborfortaj kondiĉoj. Vilaĝaj lernejoj, kie eble eĉ diplomitaj fakinstruistoj forestas, ege postrestas; sed urbetoj same ne povas postsekvi urbegojn; ĝenerale esence gravajn avantaĝojn havas la ĉefurboj kaj ties centroj kompare al la provinco kaj al la periferioj. Tavoletoj – danke al

specialaj lernejoj – povas proksimiĝi al la “perfekta” lingvoscio, dum amasegoj faras tute superflue misproportiajn fortostreĉojn. Kvazaŭ kutime oni kulpigas pro malsukceso ĉu la instruistojn, ĉu la lernolibrojn, ĉu la bazajn konceptojn, kaj tenas sin al la opinio, ke per partaj plibonigoj tamen eblus atingi esencajn ŝanĝojn ĉi-rilate.

Nuntempe en landoj, kie lingvoinstruado forte lamas, oni serioze planas elformi dum kelkaj dekjaraj popolon du-trilingvan. La loĝantaro devus scii minimume du fremdajn lingvojn, el kiuj unu devus esti aplikata aktive, la alia konata almenaŭ pasive. Samtempe statistikoj pruvas, ke en landoj, kie la lernokondiĉoj estas plej favoraj, plimulto de la enloĝantoj konas neniun lingvon krom la gepatra, kvankam tie oni povus utiligi la alproprigitan lingvon onidire ĉiutage, surstrate.

Malsukceso eĉ en Eŭropo

Nenie en la mondo estas pli fortaj la ekonomiaj, komercaj, turismaj, kulturaj kontaktoj ol en la teritorio de la Eŭropa Komunumo. Tamen laŭ la plej freŝaj indikoj en landoj kiel Okcidenta Germanio, Francio, Hispanio kaj Italio apenaŭ 6 procentoj de la loĝantaro deklaras sin dulingvaj. En Anglio, memkompreneble, la rezultoj estas pli malaltaj. Surprize, eĉ en Belgio, kie pluraj lingvoj estas oficialaj kaj la loĝantaro malsamas laŭ gepatraj lingvoj, nur ties triono parolas du aŭ pli ol du lingvojn. Intertempe ekestas konstante kaj spontane du- aŭ plurlingveco dise en la mondo, kiun produktas ne la lernejo, sed la socia medio, ekz. en ciganaj familioj.

La lernejo ĝuste nun produktas la plej evidentajn malsukcesojn – nun, kiam lingvoscio iĝas grava ankaŭ por simpluloj, precipe por intelektuloj, nun, kiam la ĝenerala evoluo postulus dulingvecon de milionoj, kiam lingvo-lernigo devus esti la plej esenca parto de la tuta lerneja instruado.

Rerigardante al la historio de la nunjarcenta lingvoinstruado, oni povas konstati, ke malgraŭ boniĝo de la sociaj kaj ekonomiaj kondiĉoj la fiaskigaj faktoroj multiĝis. Verajn rezultojn la lernejoj atingis ne en la “produktado” de du- aŭ trilingvuloj, sed en la unuecigo de naciaj, ŝtataj, literaturaj lingvoj. Oni sukcese detruis dialektojn en lernejoj, malebligis la uzadon de ilia etnolingvo por amasoj da infanoj – rezultis antaŭ ĉio batalo kontraŭ minoritataj kulturoj. Oni aplikis, foje eĉ aplikas, senskrupule

brutalajn manierojn: perforton, humiligojn, punojn eĉ fizikajn.

Inerta burokrataro

Spite al konstante akriĝantaj mal-kontento kaj kritiko, lernejoj entreprenoj interne fortiĝas, eĉ profitas el fuŝa laboro. Se aliaj entreprenoj – industriaj, agrikulturaj aŭ komercaj – produktas fuŝaĵojn, ili bankrotas; la lerneja sistemo, same misrezulta, elkovas nur pretekstojn por postuli pli grandan parton de la ŝtata buĝeto. Ju pli profundiĝas la eduka krizo, des pli fortiĝas interne la instruaj organizoj, minacante la interesojn de la socio.

Detruante lokajn tradiciojn, la ŝtata eduksistemo fariĝis enorma, monopola, plenpotenca, nekredebla inerta fronte al aktualaj lokaj pretendoj. Tiu inerto fontas precipe el tio, ke la tuta sistemo fremdiĝas, kvazaŭ sendependiĝas de la socio; la koncernatoj perdas sian eblon kontroli, esence influi la kernajn problemojn. Restas nur unu

ĝiajn avantaĝojn (facile lernebla, modeligebla, ligita al porhomara mesaĝo) kaj decidis disvastigi ĝin per la lerneja sistemo, sendepende de la Esperanto-movado. Tiuj esperoj ne realiĝas. Tute male: Esperanto malbonfartas en lernejoj cirkonstancoj. Eksperimentoj eĉ kelkjaraj alportis nenian longdaŭre validajn rezultojn, Esperanto povis enradikiĝi nek okcidente nek oriente. Oni ne sukcesis sufiĉe interesigi la infanojn, inter pedagogoj ne kreskis ĝia reputacio, lernejoj instancoj ne malkovris en ĝi pedagogiajn valorojn.

La Esperanta fiasko

Krom hazardaj kaj sporadaj informoj oni povas trovi neniajn indikojn pri tiu Esperanto-lingvaĵo, kiun gelnantoj povis alproprigi lerneje dum unu aŭ pluraj jaroj. Se tamen ekzistas iuj raportoj, tiuj ne sufiĉe fidindas: ĉiam estas intereso por troigi la rezulton kaj prisilenti la mankojn. Tion

utila, se ĝia instruado bezonas samajn metodojn, samlongajn instru-periodojn kiel ekzemple la angla?

Tiu simia imitado alportas plene adekvatajn rezultojn. Estas jam sufiĉe multaj infanoj, kiuj post kvarjara lernado de Esperanto scias preskaŭ nenion, ne kapablas kunmeti elementajn frazojn. Kredeble pluraj reprezentantoj de la esperantistaro serioze pensas: sufiĉas trudiĝi en la lernejojn, poste ĝui la gloron – pluajn laborojn la ŝtato delevis de la ŝultroj de esperantistoj, kaj la ŝtataj instancoj mem povos, laŭ lerneja maniero, esperantistigi la tutan socion, pluraj ŝtatoj la tutan homaron.

La leĝa stato de Esperanto estas la plej konvena en Hungario kaj Bulgario, tamen iu ajn povas konstati, ke en diversaj aranĝoj pedagogoj kaj infanoj el tiuj du landoj ne superas siajn kolegojn alilandajn. En Hungario, dum porinfanaj okazaĵoj, ofte partoprenantoj ĝuste el Bulgario senĉese

Ekzistas ankaŭ pozitivaj lernejoj spertoj. Togolanda instruisto AFANTCHAO Biakou Yao ricevas plenan helpon de sia liceo en Aklakou, ekz. por gastigi membrojn de la E-klubo "Pac batalantoj" ĉe Zamenhof-festo en 1989.



elekto: subiĝi al la supera volo. Individuaj kaj grupaj interesoj iĝas senindulge subpremitaj, perdiĝas ĉies fido je la lernejo. Tiuj ĉi gigantaj maŝinoj funkcias laŭ ŝtoniĝintaj reguloj kun potencega burokrataro, helpe de staboj de pseŭdo-sciencistoj kaj internaj brigadoj kontrolaj, laborigante en hierarkia sistemo armeojn da grizaj dungitoj, plej ofte malbone pagataj instruistoj.

Vere, ke la temo mem ne postulas analizon de tiuj ĉi cirkonstancoj; la esperantistaron pli interesas la sorto de la internacia lingvo en la lerneja sistemo.

Longe daŭris la strebado enkonduki Esperanton en la lernejojn. Iam ŝajnis esti ĝusta la espero: se ĝi estos instruita komence nur en kelkaj lernejoj, la koncernaj potenĉavuloj ekkonos

tamen eblas tre facile pruvi, ke en la movado apenaŭ estas personoj, kiuj ellernis Esperanton plene en lernejo: plimulto de la aktivuloj lernis la lingvon aŭtodidakte. Nur en Hungario lernejoj devintus produkti jam plurmilon da esperantistaj junuloj; tiuj same komplete perdiĝis kiel la mili-onoj, kiuj devus povi paroli la rusan aŭ aliajn lingvojn.

Kelkaj landaj asocioj – baze sur imagitaj ĝisnunaj rezultoj – celas jam ne nur enkonduki Esperanton, sed egalrajtigi ĝin al ceteraj lingvoj. Oni ŝatus, se ĝi estus almenaŭ elektele deviga, poste plene deviga studobjekto. Oni ŝatus, se la instruado de Esperanto okazus tute same kiel tiu de iu ajn lingvo, kun perfortaj notoj, en ĉiuj lernejo-tipoj. Je kio ĝi estas efektive

krokodilas: kaj la infanoj kaj la gvidantoj ne komprenas Esperanton. Foje eĉ tiuj instruistoj apenaŭ scipovas balbuti en Esperanto, kiuj prezentas modellecionon dum pedagogia seminario.

Ekspluato kaj uniformigo

En lernejoj multe pli gravas ŝajnigi ol fari laboron. Se en iu lernejo Esperanto estas instruata, la gvidantaro klopodas profiti de tiu ĉi fakto. La efektivan scion de la infanoj neniu eksterulo kapablas prijuĝi, krom esperantistoj – sed oni povas facile kreskigi la reputacion de la lernejo, se la infanoj ofte prezentiĝas antaŭ publiko: kanto- kaj dancovesperoj, ekspozicioj kaj solenaĵoj multe gravas por tio. Misuzi infanojn je individua profito,

laborigi ilin dum porokazaj eventoj, ekspluati ilin – je tio ankaŭ Esperanto povas esti konvena. La lerneja gvidantaro kontentiĝas je la akcesora agado de enlernejaj Esperanto-grupoj.

En lernejo oni ŝatas infanojn mezkapablajn. Dum la uniformiga strebado ili kondutas plej konvene. La bonkapablaj ne volas enue, malrapide antaŭeniri, la postrestintoj ne kapablas samritme evolui. Konfliktoj ekestas ĝuste pro tiuj du tipoj. Studobjektojn la lernejo aranĝas malsame pro ekonomia bezono, modo aŭ lokaj cirkonstancoj, ordigas ilin kvazaŭ hierarkie, laŭ agnoskata valoro. En tiu ĉi sistemo la *humankarakteraj* studobjektoj flankenpuŝiĝas, eventuale eĉ lingvoj, kaj Esperanto memkompreneble staras ĉe la fino. Sekve oni simple ne tolerus, malpermesus aktivadon plusan de fervora instruisto, kiu klopodus pli serioze, pli elane kaj pli rapide instrui Esperanton ol planite, ol permesite. Tial Esperanto estas interesa nur dum la unuaj studhoroj, kiam la infanoj ankoraŭ spertas ion, kio estas netipa, iasence stranga, eksterordinara. Poste, kiam oni kaptas la ritmon de la cetera instruado, la interesiĝo komencas regresi, vekiĝas enuo. Inter du maloftaj studhoroj, kiuj, pro la malgranda prestiĝo de Esperanto, estas en la plej maltaŭgaj tempoj, la infanoj grandparte forgesas la pli frue alproprigitajn konojn. Eĉ en la plej kontentiga kazo la tempo sufiĉas nur por ripetado, por nesufiĉa okupiĝo pri la nova materialo. La infanoj scias nur la *aktualajn* partojn, kiujn la instruisto antaŭvideble pridemandos. La efektiva celo – havi kompletan lingvoscion, posedi plenan lingvosistemon – forvaporigas, restas la ĉiutaga devo lerni por elteni dum kontrolado.

Pri degeneriĝo de Esperanto en lernejoj cirkonstancoj liveras signojn studkonkurso aranĝata en Hungario. Post plurjara amatora okazigo, la Landa Pionira Organizo ekprizorgis ĝin, sed spite al favoriĝo de la cirkonstancoj (ekz. pli valoraj premioj), la nombro de sinanoncantoj kaj partoprenantoj malkreskas, la rezultoj tute ne imponas. Alia kazo: en la t.n. Pionira Urbo de Zánka (same Hungario), en 1987 oni denove disponigis 120 lokojn por feriado de la plej elstaraj lernantoj de Esperanto. Oni intencis akcepti ankaŭ 20 infanojn eksterlandajn, sed fine venis neniu el Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Pollando kaj Jugoslavio (el aliaj landoj oni eĉ ne invitis infanojn). Verŝajne estus ege malfacile varbi en tiuj landoj esperan-

Helpu al esperantistoj en Rumanio!

Tra Eŭropo kaj la mondo iris ondo da ĝojo, kiam la rumana popolo reprenis sian landon fine de decembro. Tiun ĝojon dividas kompreneble dekmiloj da esperantistoj. En ĉi tiu revuo vi povis legi pri la persekutoj, kiujn suferis la rumana movado – du ĝis tri mil homoj, kiuj ne plu rajtis uzi sian lingvon. Kaj nun el la gazetoj vi sendube eksciis pri la detruita stato de la lando. Tre verŝajne ankaŭ vi demandis vin: Kiel mi povas helpi?

UEA ricevas, de post la mezo de januaro, leterojn de rumana esperantistoj. El tiuj evidentiĝas la plejaj bezonoj de la movado. Ili sopiras unuavice al legaĵoj kaj kontaktoj: al revuoj, libroj, kasedoj, diskoj, negrave ĉu malnovaj; al leteroj kaj vizitoj. Preskaŭ nenio sukcesis atingi ilin dum la lastaj jaroj, sed ni jam havas konfirmon, ke la decembra numero de *Esperanto* venis bonorde tra la poŝto. Nun UEA resendis la tutan jar-kolekton el 1989 al siaj 27 rumana membroj (ĉiuj aligitaj jam de pluraj jaroj el Fondaĵo Canuto). Novaj alskribintoj estas konstante aldonataj al nia membrolisto. De ĉiuj ni petis infor-

mojn pri la nuna stato de la movado, kaj ankaŭ telefonan kontakton ni provas starigi. Jam atingis nin informoj, ke prof. Ignac Bociort iniciatis en Timiŝoaro la fondon de Rumana Esperanto-Asocio, dum la kluboj en diversaj lokoj reaktiviĝas.

Dum ni atendas pliajn novaĵojn, ni proponas jenan servon al tiuj, kiuj volas helpi la rumanan esperantistaron sed ne disponas pri adresoj. Ĉiuj sumoj senditaj al UEA-konto "Rumanio" estos uzitaj por rekta helpo al la rumana movado, per membrigo, sendo de legaĵoj, papero, skribiloj, tajpiloj kaj similaj aferoj – precipe al kluboj kaj asocioj, kie eble. Same bonvenaj estas tiaj materialoj mem – denove, ne nepre novaj, sed utilaj kaj funkcipovaj: indiku sur ili "por Rumanio". Se vi deziras, ni povos sendi al vi unuopajn aŭ klubajn adresojn por ke vi starigu pli personan kontakton – kvankam nur tiel rapide, kiel oni sendos ilin al ni el la lando mem.

Anticipan dankon pro via solidara agado! Ni daŭre informos vin pri la evoluo en Rumanio, tiom kiom ni scias ĝin.

tistajn infanojn, kiuj povus inde reprezenti tiujn per sia lingvoscio. Eĉ en Hungario, malgraŭ malaltaj kotizoj, oni povis anonci ĝis la unua limdato malpli ol 50 infanojn (nur 1 el la tuta Budapeŝto). Por eviti kompromitiĝon, HEA decidis certigi senpagajn lokojn al eminentaj esperantistaj infanoj kaj grandsume subvencii aliajn. Fine ĉiuj lokoj estis okupitaj, sed la rezulto mizeris. El iu urbo venis 40 infanoj, el kiuj 1 paroletis Esperanton. Eĉ inter la agnoskataj *eminentuloj* estis balbutulo, kiu ne povis respondi al jenaj demandoj: "Kio estas via nomo? El kiu urbo vi venis?" Nur tiuj kapablis senĝene paroli Esperanton, kiuj devenis el iel Esperanta medio, kiuj alproprigis ĝin hejme, helpe de ne instruisto, sed gepatroj aŭ parencoj.

Transdoni valorojn necesas

Esperanto instruata en lernejo estas valoro apenaŭ taksebla. Ĝia enkonduko en bazajn kaj mezajn lernejojn levis ĝian prestiĝon, sed pro la nealveno de la antaŭplanitaj, tre atendataj rezultoj, tiu ĉi prestiĝo de la internacia lingvo povas ne nur senspure perdiĝi,

sed ankaŭ elvoki danĝeran precedenton. (En superaj lernejoj/universitatoj Esperanto povas enradikiĝi pli forte, ĉar tie ĉarlatanismo, altrudado – en la kazo de Esperanto – ne ludas esencan, ĝenerale eĉ ne akcesoran rolon.)

La spertoj klare indikas, ke lernejoj povus labori efike por Esperanto ne nepre per instruado laŭtradicia, sed per ĝusta informado pri la monda lingvoproblemo (kadre de historio, geografio, literaturo) kaj klarigado pri la raciaj solvoj, per larĝskala (ne izolita) instigado de la infanoj partopreni en mallongaj, intensaj kursoj ĉu en ĉu ekster la lernejo, kie eblu ankaŭ prizorgi samtempan aplikon de la akirita lingvoscio ne trude, sed en vere internacia medio.

Nuntempe en lernejoj cirkonstancoj ne eblas atingi rezultojn pri tri esence gravaj aspektoj de la sama laboro: informado (varbado), instruado kaj apliko. El tio oni plenumas nur duonon, trionon... Laboro farita one ankaŭ en la kazo de Esperanto valoras malpli ol nenia laboro.

ErnTM Csiszár (Hungario)

Instruado:

Cele al ekonomia kaj profesia bazo

ILEI nun forlasas la periodon de re-organizado kaj revigligado por eniri periodon de realigoj kaj plenumado de faritaj promesoj. Inter tiuj troviĝas:

- **Eldonado**, sur ekonomia kaj profesia bazo, de diversspecaj pedagogiaj verkoj, i.a. internaciaj lernolibroj, korespondaj kaj perfektigaj kursoj, legolibroj je ĉiuj niveloj kaj kategorioj, didaktikaj kaj metodologiaj verkoj. Plie, produktado de son- kaj vidbendoj, de didaktika materialo kaj la eldonado de informaj verkoj. Tiuj eldonaĵoj estos vendataj kaj produktos enspezojn, sed ni ankaŭ antaŭvidas senpagan uzon por valoraj kaj meritplenaj gekolegoj en malriĉaj landoj.

- **La edukado/trejnado de instruantoj** kaj la perfektigo de profesiaj geinstruistoj je ĉiuj niveloj. Por fari tion, estos necese organizi kursojn kaj ekzamenojn en zorge selektitaj centroj kaj institutoj tra la mondo. Kvankam la kandidatoj pagos por la kursoj kaj la ekzamenoj, ni tamen bezonos pli da mono por pagi eĉ limigitan honorarion, vojaĝkostojn kaj restadon al la kursestroj, doni stipendiojn/subvenciojn al meritplenaj gestudentoj, eventuale ankaŭ por pagi luprezon por la uzotaj salonoj.

- Por daŭre aktualigi sian laboron, ILEI nepre devas fari sciencan esploron, partopreni en fakaj kolokvoj, kongresoj kaj konferencoj, aboni fakajn revuojn, ktp.

Ne eblas daŭrigi senpune la kutimon ĉion fari senpage. Estas normale ke kapablaj kaj aktivaj fakuloj trovu iun *financan kompenson* al sia por-esperanta penado, sia sindediĉo, la uzo de sia tempo kaj energio, kondiĉe ke tio servu rekte kaj nekontesteble al la progreso de la Esperanto-komunumo. Ni pensas i.a. pri verkistoj, tradukistoj, kursestroj, sciencaj esplorantoj... ILEI urĝe bezonas *Centran Oficejon* kun konstanta adreso, kiu devus situi en iu ekzistanta, bone funkcia E-centro aŭ -instituto, sed al kiu ILEI devus pagi luprezon, deĵoranto(j)n, ekipaĵon, telefonadon, fotokopiadon ktp.

Fine, urĝas ke ILEI organizu vastan kaj konstantan *informkampanjon* en pedagogiaj medioj en pluraj landoj samtempe laŭ jam ekzistanta laborplano, aprobita de la estraroj de UEA kaj ILEI.

Sed ĉiuj tiuj projektoj kaj celoj postulas monon, multan monon, kiu ne povas veni de la nuraj kotizoj.

La Fondaĵo Szerdahelyi

La enspezoj el la kotizoj kaj el la ekzistanta kapitalo servas al la ĉiutaga funkciado de la asocio, la eldonado de IPR (*Internacia pedagogia revuo*), la informaj cirkuleroj k.s.

Por realigi la ampleksajn kaj nepre necesajn projektojn kiujn ni menciis ĉi-supre, ILEI tamen bezonas multe pli da enspezoj. Por kolekti la bezonatajn novajn monrimedojn, la estraro decidis starigi Fondaĵon, kaj apelacias al la donacemo de tiuj homoj, membroj kaj nemembroj, kiuj deziras finance apogi la agadon de ILEI. Honore al prof. d-ro István Szerdahelyi, eminenta pedagogo kaj verkisto, fondinto de la Esperanto-Fako ĉe la Universitato ETMtvTMs Loránd en Budapeŝto, kaj prezidinto de ILEI de 1985 ĝis 1986, la estraro proponas kunligi lian nomon al la fondaĵo.

Donacantoj povas pagi al unu el la ekzistantaj kontoj de ILEI:

- poŝtgirkonto n-ro 682117-7 (Stock-

holm) "La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)", Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedio);

- poŝtgirkonto n-ro 3789 64 (Den Haag) de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando), por la konto de ILEI, kodo ilek-a;


kun la klara mencio: donaco Fondaĵo Szerdahelyi.

La nomoj de la donacintoj regule aperos en *Internacia pedagogia revuo* en konstanta rubriko. Du revizoroj, nomitaj de la komitato dum la ĉiujara ILEI-Konferenco, antaŭ la unua de julio kontrolos la en- kaj elspezojn de la fondaĵo kaj faros raporton, kiu estos pridiskutata dum la sekvonta ILEI-Konferenco, kaj kiu aperos en la septembra numero de IPR.

En IPR, 1989, numero 1 aperis la laborplano de ILEI. Mi apelacias al via aktiva engaĝiĝo, al via entreprenemo, al via iniciatemo por helpi al la estraro de ILEI realigi tiun planon. Ne estas limo al la eblecoj, se ni serĉas kaj kaptas la okazojn!

Edward Symoens
Prezidanto de ILEI

INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE UEA/ILEI: REZULTOJ



Elementa ekzameno 1989

74-a Universala Kongreso (julio)

Belgio: Robert Burnay; Francio: Dominique Couturier; Svedio: Agneta Emanuelsson, Kaisa Hansen, Inger Sjöberg.

Nanning (novembro)

Ĉinio: Li Li, Qin Dexiong, Huang Jianmin, Chen Jiantong, Gu Yulin, Pan Zhonghai, Zhao Xuegang, Liu Weizhuang.

Kigali (decembro)

Ruando: Gérard Ndalihoranye

Meza ekzameno 1989

La Chaux-de-Fonds (januaro)

Francio: Alain Favre, Jacqueline Poux, Fernando Vurpillot; FR Germanio: Michael Scherm; Nederlando: Piet Ransijn, Wim Derks; Svislando: Nicole Margot.

La Chaux-de-Fonds (aprilo)

Belgio: Denise Dupont; Francio:

François Stackler; Svislando: Franz Brugger, Mireille Grosjean-R.

San Francisco (julio)

Kanado: Sylvain Bélisle, Stevens Norvell; Usono: Lewis Cook, Robert Dwelley, Martha N. Flores, Donald Harlow, Ionel Onet, Derek Roff.

45-a Internacia Junulara Kongreso (julio)

Germanio FR: Daniel Svejda; Jugoslavio: Ljiljana Pranjić, Zdravko Seles; Nederlando: Nora Grooten; Norvegio: Claude Rouget.

74-a Universala Kongreso (julio)

Brazilo: Cicero Soares; Irlando: Joy Davies; Italio: Maria-A. Massidda; Usono: Arnold Victor.

Nanning (novembro)

Ĉinio: Wei Bing, Liu Jianguo, Lu Jixin, Chen Min, Liu Shaozhong, Zheng Tongmin; Usono: Doris Wheeler.

	Kontentige	Bone	Tre bone	Sume	Landoj
Elemente	3	7	4	14	5
Meze	9	15	11	35	13
Sume	12	22	15	49	15

Instruado:

En Ĉinio mankas la "daŭriga rimedo"

En Ĉinio estas ĉ. 400 000 esperantistoj. Sed plimulto el ili estas, bedaŭrinde, komencantoj. La problemoj estas, ke mankas taŭgaj lerniloj kaj legaĵoj interesaj kaj progresigaj. Unuflanke, elementaj lernolibroj estas tiel facile troveblaj ke ni preskaŭ ne scias kiun elekti. Aliflanke, mezgradajn lernolibrojn ni tre malfacile trovas, precipe lernolibrojn pri scienca Esperanto. Eble ni povas aboni bonan gazeton kiel *El Popola Ĉinio* aŭ *Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj*, sed la longaj frazoj kaj multaj novaj vortoj timigas la komencantojn.

En la arto de goo studiĝas la "daŭriga rimedo". Ĉi tio ja mankas al E-lernado en Ĉinio. Krom kelkaj studentoj inteligentaj kaj diligentaj, multaj esperantistoj intense bezonas laŭŝtupajn lernilojn. Se tiujn ili ne akiras tuj post sia esperantistiĝo, ili iom post iom perdas intereson lerni kaj uzi Esperanton. En Esperanto-Asocio de Orient-Ĉinia Normala Universitato, oni postulas ke la asocioj verku aŭ traduku E-artikolojn. Sed korektado bezonas multan tempon kaj energion, kiujn ne havas la ordinarnaj studentoj, nek aliaj esperantistoj laborantaj diversloke. La asocio ankaŭ pruntedonas E-librojn kaj gazetojn, sed tiu sentiĝas tre malfacilaj por kompreni.

Ho, se nur ni havus dekojn da diversaj taŭgaj libretoj – kiel "konversacian literaturon". Tiam legaĵon ni penas elfari. Unu el la celoj de *Edeno* (la bulteno de OĈNU-a EA) estas aperigi kiel eble plej multajn mallongajn verkaĵojn kaj tradukaĵojn facile legeblajn. Trovi tiujn bezonas tempon. Tial, ni petegas ke en- kaj eksterlandaj esperantistoj spertaj kaj fervoraj nin apogu:

- sendante facilajn kaj interesajn legaĵojn;
- liverante taŭgajn lernolibrojn mezgradajn aŭ scienc-Esperantajn;
- verkante aŭ tradukante artikolojn por nia gazeto *Edeno*.

Ni kore dankos vin kaj sendos donacetojn al vi niaj apogantoj.

Esperanto-Asocio de OĈNU
Leterkesto 8624,
Hua Dong Shi Fan Da Xue
Orient-Ĉinia Normala Universitato
Shanghai, Ĉinio



La Budapeŝta Esperanto-fako en 1989 (docento Ilona Koutny staras en la fronta vico, dua de dekstre).

Universitatoj:

Interlingvistiko per korespondado

Post longaj preparlaboroj, la Esperanto-fako de la Budapeŝta Universitato ETMtvTMs ĝoje raportas, ke ĝi rajtas oferti internacian korespondan interlingvistikan kurson tute en Esperanto. Se estos sufiĉe da aliĝintoj, ĝi komenciĝos en septembro 1990. La 3-jara kursaro kondukos al ŝtate rekonata diplomo. (Plenaj informoj sube.)

Al eksterlandaj studentoj kun superagrada diplomo estas ankaŭ eble enskribiĝi por la taga Esperanto-fako, kiu daŭras nur du jarojn kaj inklu-

zivas enkondukon en la hungarajn kulturon kaj lingvon. Kandidatoj por kompleta universitata formado en Esperanto plus unu alia fako (5-jara kurso) estas same bonvenaj. Por ĉiuj kursoj necesas resendi la aliĝilon antaŭ la 30-a de majo 1990.

Cetere la aktuala nombro de la tagaj gestudentoj altiĝis al 30. En junio 1989 12 pliaj gestudentoj finis siajn 3-jarajn postdiplomajn studojn en la enlanda koresponda fako, kaj ekde septembro 10 novaj studas tie.

Ilona Koutny

INTERNACIA KORESPONDA INTERLINGVISTIKA FAKO

komenciĝos la unuan fojon en la studjaro 1990/91 (poste ĉiun trian jaron).

La 3-jara postdiploma formado (entute 6 semestroj) celas doni ĝeneral-kaj aplik-lingvistikajn bazojn por la studado de Internacia lingva komunikado, okupiĝas detale pri la problemoj de interlingvistiko kaj pri diversaj terenoj de esperantologio (priskriba gramatiko, literaturo, movadhistorio).

La bazaj studobjektoj koncentriĝas en la unuaj du jaroj; la tria jaro ebligas enprofundiĝon en elektitan fakon (Esperanta gramatiko, Esperanta literaturo, lingvopedagogio [por instruistoj], ĵurnalistiko kaj redaktado de eldonaĵoj, krome komputila lingvistiko laŭ la planoj).

Postuloj: superagrada diplomo (min. bakalaŭro, licencio) kaj scio de Esperanto.

Formo: orientiga vizito en septembro 1990, poste po ĉ. unusemajna restado en Budapeŝto dum semestrofinoj por prelegoj, konsultiĝoj kaj ekzamenoj. Tiam la gestudentoj ricevas ankaŭ informojn kaj materialojn por la sekva semestro. Dum la semestro ili devas memstare labori surbaze de la disdonita temaro kaj plenumi skribajn taskojn.

Rezulto de la studoj: fine de la tria jaro finpretigo de faklaboraĵo aŭ disertacio, kaj ŝtata (kompleksa) ekzameno. Depende de la origina diplomo kaj de la disertacio, akiro de diplomo (magistra grado) aŭ de doktora grado (ties limdato estas plilongigebla).

Kotizo (laŭ semestroj): 300 usonaj dolaroj.

Aliĝo: Eötvös Universitato, Rektori Hivatal Oktatási Osztálya, Szerb u. 21-23 I/28, H-1053 Budapest, Hungario.



Oomotanaĵoj
gejunuloj faras
skeĉon okaze de
la Korea-Japana
Esperantista
Junulara Ren-
kontiĝo en Seulo.

Interŝanĝoj:

Arto kunigas koreajn kaj japanajn junulojn

Esperantistoj ofte diras: "Esperanto estas mirakla lingvo por ligi homojn trans diversaj bariloj." Tamen por sperti ĝin oni bezonas vojaĝi aŭ ĉeesti en internacia evento de Esperanto. Des pli bedaŭre, ke plejparto de aziaj junuloj ankoraŭ malofte havas tiajn okazojn, kvankam ili jam eklernis Esperanton.

De la 29-a de septembro ĝis la 5-a de oktobro 1989, 77 oomotanaĵoj karavane vojaĝis al tri koreaj urboj: Seulo, Taegu kaj Pusan, por partopreni en la 21-a Korea Kongreso de Esperanto kaj aparte havi interamikiĝajn kunvenojn kunlabore kun Korea Esperanto-Asocio kaj Korea Esperanto-Junularo.

La karavanan vojaĝon, kiu celis kulturan interŝanĝon kaj interamikiĝon, organizis Junulara Fakto de Oomoto kaj Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto. Kiel ties honora prezidanto, s-ro Kyotaro Deguchi gvidis la karavanon kune kun s-ro Yosimi Umeda, eksvicprezidanto de UEA, samkiel pasintjare interamikiĝvojaĝon de oomotanoj en Ĉinio.

La 21-a Korea Kongreso okazis la 30-an de septembro kaj la 1-an de oktobro kun pli ol 350 partoprenantoj, inkluzive de 82 japanoj, ĉe Kolegio Yeung-jin en Taegu. En la mezo de la lando, Taegu estas kvazaŭ la lulilo de la Korea Esperanto-movado, kaj jam naskis multajn eminentajn e-istojn.

Dum la malferma ceremonio okazis la prezento de diversaj koreaj tradiciaj artoj fare de Tradicia Arttrupo de Universitato Dankook kaj Korea Altlerneja Esperanto-Ligo. Ne malmultaj

partoprenantoj entuziasmiĝis pri *samulnori*-ludo en la programo. Vespere la junaj anoj de ambaŭ landoj havis okazon konatiĝi unu kun la alia, grupe vizitante kaj kafejon kaj drinkejon. Tio tiom multe ĝojigis du koreajn junulojn, ke simila konatiĝo tuj poste enprogramiĝis en aliaj urboj.

La 2-an de oktobro, vespere, okazis Korea-Japana Esperantista Junulara Renkontiĝo en la junulara gastejo Bando, Seulo, kun la partopreno de ĉirkaŭ 150 junaj e-istoj el la du landoj. En la renkontiĝo, kiu daŭris tri horojn, koreaj e-istoj prezentis siajn tradiciajn artojn: *taekwondo*, *salpuri*, *samulnori*, *pungmul*, *minyŭo*. Oomotanoj siaflanke faris floraranĝon, teceremonion, skeĉon el japana legendo, kantadon en Esperanto k.a. Gaja kulmino de la amikecplena kunveno estis kuna popoldancado *aŭaodori* el la japana insulo Sikoku. Kiel kutime la fermo ornamigis per viglaj Esperantaj kantoj de la ĉeestantoj.

Kvankam la karavana restado estis tre limigita en Koreio, tamen profunde ĉiziĝis en la koroj de oomotanaĵoj la firma amikeco de koreaj gesamideanoj kiuj tre varme bonvenigis ilin en diversaj okazoj. Kaj estas evidente, ke tiu ĉi komuna evento helpas la disvolviĝon de la junulara Esperantomovado en la du landoj. La interŝanĝo de tradiciaj artoj kaj kulturoj per Esperanto servis kiel rimedo por pli profunda interamikiĝo. Tiaj klopodoj estas aparte gravaj inter popoloj kiuj ankoraŭ memoras la kruelaĵojn interpopolajn de la dua mondmilito.

EPA

Terminologio:

Necesas lerni de ekstere

Inter la 28-a de aŭgusto kaj la 1-a de septembro en Vieno okazis la unua TermNet Somera Lernejo. Kiel membro de TermNet, Terminologia Esperanto-Centro (TEC) rajtis aligi unu partoprenanton senpage, kaj pro planoj ke mi laboru kiel TEC-sekretario, oni delegis min.

La programo de la Lernejo estis tre riĉa kaj instrua. Prelegis Galinski, Nedobity, Krommer-Benz, Budin, Pich kaj Thaller. Temoj estis: ĝenerala teorio de terminologio, terminografio, faka lingvo, internacia kunlaboro en terminologio kaj aliaj. Gravaj partoj de la programo estis praktika laboro kaj demonstrado de komputilaj helpiloj en terminologio.

Granda ĝojo estas studi kaj lerni en la centro de la monda terminologia aktivado. Multaj demandoj kaj duboj pri la strategio de TEC estis pli klaraj kaj solveblaj post interŝanĝo de spertoj kun aliaj partoprenantoj kaj post interparoloj kun eminentaj terminologoj pri la teorio kaj praktiko de terminologio. Tiel konfirmiĝis opinio de multaj TEC-anoj, ke oni devas multe pli aktive lerni de la ekstermovada terminologia scienco.

Ĉu supertakso de la movado?

Infoterm kaj TermNet montris agrable grandan intereson pri Esperanto, kaj dum la prelegoj oni ne subtaksis Esperanton. Eĉ male, ĝi estis supertaksata, speciale rilate la nombron de fakuloj-esperantistoj kaj la financajn povojn de Esperanto. Ni devas klopodi pravigi tiel pozitivan opinion.

Oni montris al la partoprenantoj la tre riĉan bibliotekon de Infoterm en kiu oni, interalie, zorgas pri parto de la heredaĵo de Wüster. En tiu ĉi biblioteko oni ankaŭ kolektas informojn pri terminologia aktiveco en 14 lingvoj. Bedaŭrinde, informoj pri Esperanto preskaŭ ne ekzistas.

Ankaŭ en la jaro 1990 TEC devus eluzi tiun ŝancon sendante unu aŭ pli da partoprenantoj al tiu ĉi Lernejo. Tio estas la plej bona maniero pli grandigi la sciojn pri terminologio inter la esperantistaro – eduki terminologojn surbaze de la scioj de eminentaj internaciaj institucioj.

Ankica Jagnjić (Jugoslavio)

Okcidenta Eŭropo postlumas la mondon

Malgraŭ malsano, UEA-komisiito Robert Llorens daŭrigis en 1989 sian elstaran prizorgon de KSM. Tiu gravega servo bezonas trovi novan kompetentulon, kiu transprenu ĝin konsulte kun s-ro Llorens. Ĉu iu bonvolus anonci sin al la Centra Oficejo? El la suba raporto vi povos konstati, kiajn taskojn alfrontas prizorganto....

Aliĝintoj

En 1989, 958 aliĝintoj, en 1988, 1044, do -8,24%. Nur el Pollando, 172 en 1989 kaj 490 en 1988. Sen prikalkuli la polojn, estas 786 alskribintoj en '89 kaj 554 en '88, do +41,88%. La poloj malpli skribis, verŝajne ĉar KSM ne povas trovi por ili korespondantojn el okcidentaj landoj.

De 1986, la nombro de korespondemuloj konstante kreskis en Argentino, Brazilo, Bulgario, Ĉinio, Francio, Sovetunio. Konstante malkreskis en Irano kaj Svedio. El okcidenta Eŭropo ĉiam ne sufiĉe da korespondemuloj. Ĉi-jare, inter la unuaj dek landoj, nur unu okcidenta, Francio.

Nombro de KSM-korespondantoj laŭ kontinentoj, 1986-1989.

Financo kaj materialo

En 1989, kotizoj 2 557,20 F. (2,67 F. por ĉiu aliĝinto) pagitaj de 272 anoĵ, 686 ne pagis. 907 leteroj senditaj. 141 leteroj aŭ poŝtkartoj estis senditaj pere de s-ro Hasala en Ĉeĥoslovakio.

Ĉiu el nepagipova lando ricevis respondon de KSM, kondiĉe ke en la sliparo estu adreso konvena al la deziroj.

La jaro finiĝis kun en la kaso defikto de 1 147,80 F. kaj nur +343,17 F. ĉe la poŝtkonto, pro la aĉeto de la


komputilo. Tiu povas enlistigi informojn por pluraj miloj da aliĝintoj. La laboro estas multe pli facila kaj postulas malpli da tempo. Kompreneble tiu komputilo estas la posedaĵo de KSM.

Agado

Kiel ofte skribite, la funkciado de KSM ne estas kontentiga pro manko de adresoj el okcidentaj landoj, la plej ofte petataj. Sed ankoraŭ estas tro da korespondaj servoj en la mondo. Ekzemple en Japanio estas du tiaj. Tiel el tiu lando ne venas multaj petoj.

KSM povus havi pli da alskribintoj, se ĝi estus pli konata al la eklernantoj de Esperanto. Por tio, povus helpi la Esperanta gazetaro.

Robert Llorens (Francio)



Kulturo:

Pri dokumentoj kaj detaloj

Mi legis kun intereso la raporteton de Ulla Luin "Ĉu ni ŝparas nian historion?" (novembro 1989) pro du kialoj: unue, ĉar interesas min la historio de la Esperanto-movado, kaj due, ĉar ankaŭ mi pruntas en mia hejmo spacon por esperantaĵoj. Mi kribras la ricevitaĵajn paperojn, forĵetante tiujn kiuj evidentiĝas senvaloraj. Mi opinias min kapabla flari tion, kio povas havi historian valoron – ĉu loka, regiona aŭ nacia – sed se mi trovas ion de dubinda valoro mi emas konservi ĝin. Libroj, revuoj kaj bildoj, kiujn mi opinias valoraj, fine iras al la Biblioteko Montagu Butler en Londono. Sed la tralegado de libroj, malnovaj leteroj ktp estas temporaba. Tamen ni bezonas dokumentojn se ni intencas verki nian historion, kaj ni jam estas pli ol 100-jaraĝaj!

Tre ofte oni trovas erarojn en libroj kaj artikoloj kiujn oni taksas fidindaj konsultaj kaj referencaj dokumentoj. En la *Enciklopedio de Esperanto* estas eraroj pri datoj, lokoj, nomoj, iam eĉ pri la sama temo en apartaj eroj. Recenzistoj de tempo al tempo mencias erarojn trovitajn en la recenzataj verkoj, sed kiu korektas la originalojn? En verko antaŭ nelonge eldonita, mi trovis mian nomon inter tiuj de aktivaj hispanaj esperantistoj, kiuj ekziliĝis post la interna milito, sed mi ne eklernis Esperanton ĝis 1947 kaj mia aktivado en la movado ĉiam estis, kaj estas, en Britio! Mi opinias ke tiuj eraroj okazas pro manko de haveblaj dokumentoj, kaj pro tio la verkisto devas fidi sian propran memoron aŭ, pli riske, la memorojn de aliaj. Nomoj forgesiĝas, datoj miksiĝas, sed kiam ili

aperas inke sur libra paĝo, ili eterniĝas kiel vero.

Mi ne volas fini sen mencio de la libro de Antonio Marco Botella: *Analoj de la Esperanta Movado en Hispanujo*. Laŭ mia scio ĝi estas la nura verko, kiu tiel plene registras iun ajn nacian movadon. Kiom da paperaĵoj li devis legi dum la dujara laboro! Ŝajne en Hispanio oni sukcesis konservi sufiĉajn dokumentojn por permesi la verkadon de ĉi tiu historio, malgraŭ la malfacilaĵoj inter 1937 kaj 1948.

Amador Díaz (Britio)

Analoj de la Esperanta Movado en Hispanujo, unua volumo 1887-1953, dua volumo 1954-1987. Antonio Marco Botella. Eldonis "Frateco", Calle San Vicente Paul 1, E-50001 Zaragoza, Hispanio.

Informado 2

Iom da psikologio

En la unua artikolo, en januaro, mi provis konvinki vin ke informado signifas: atenti pri la bezonoj de tiuj homoj, kiujn ni volas informi. Nur kiam iliaj bezonoj harmonias kun nia celo por diskonigi Esperanton, informado estas senchava kaj efika. Tial necesas ankaŭ ioma kompreno pri la evoluo de tiuj bezonoj.

Ĵus naskita infano povas agadi nur spontanee kaj intuicie, al ĉio ajn kion ĝi renkontas. Sed rapide, pro la reguloj de la plenkreskuloj, estiĝas kutimoj kiuj restos dum la tuta vivo. En la sama periodo, infano ankaŭ faras multe da decidoj pro emociaj kaŭzoj. Post plurfoja malagrabla, aŭ eĉ post unu malagrabla sperto, infano ofte decidas eviti tian travivaĵon.

Plenkreskaj, ni do vivas kun multe da tradicioj kaj vivdecidoj el la infanaĝo. Ofte tiuj ne plu estas adaptitaj al la nuna vivsituacio. Manĝi ĝis malbonfarto por eviti forĵeton de la manĝo povus esti kutimo el periodo de ĝenerala manko. Viro, kiu malamas ĉiujn virinojn, eble ĉar li havis kruelan vartistinon, aŭ virino, kiu ne povas ligi sin al kunulo, ĉar ŝi neniam akceptis la kruelan forpason de unu el la gepatroj en frua aĝo, estas ekzemploj kiujn vi eble rekonas el via propra ĉirkaŭaĵo.

Feliĉe ekzistas ankoraŭ tria mensero: nia kapablo por analizi, prijuĝi kaj lerni. Bedaŭrinde tiu kapablo estas subevoluinta ĉe la plimulto. Nur tre malmultaj homoj sukcesas retaksi la tradiciojn, kiujn ili heredis aŭ kuraĝas retroiri al la unuaj gravaj spertoj en la infana vivo por reekzameni iam faritajn decidojn.

Ludi per la homa menso

Merkat-esploristoj (aŭ simple: merkartistoj) konstante analizas la konduton de la homoj en la socio. Ili ludas per la malkovritaj bezonoj, precipe sur la emocia tereno, kaj sukcesas manipuli homojn. Vi eble jam rimarkis, ke modernaj reklamoj malmulte informas pri la koncerna produkto, sed pli emfazas ferian, neformalan etoson, montras homojn sukcesajn, superajn al la aliaj, uzas multe da statusosimboloj... kaj fakte bildigas, kion multaj homoj ne diras sed pri kio ili jes revas. Tiuj revoj estas

rimedo por kompensi la timojn, la frustruojn, la malagrablajn sentojn kiujn mi ĉi-supre aludis.

Ni ne volas manipuli homojn, sed ni jes povos grandigi niajn ŝancojn solvi la lingvan problemon en la mondo. Ni provu iomete ludi per la supre menciitaj ecoj de la homa menso. Ekzistas ja homoj, kiuj estas tiel edukitaj, ke ili nepre volas savi la situacion. Mal-facilas, sed se oni sukcesas "kapti" tian homon en societo, ĝia pluvivado estas garantiita. Ĉu tian raran homon oni volas malkovri per nia informado? Tiam emfazu la mankojn en la propra agado.

Ekzistas ja homoj, kiuj ne kontentas pri la establita socio – sed ilia kritiko jam aspektas kvazaŭ neracia persekutemo. Ili jes pretas investi multe da energio en alternativa movado, sed neniel sukcesas kunlabori. Ĉu tiun ni allogu? Tiam formulu akran kritikon.

Ekzistas ja amaso da homoj, kiuj lacas pro laborsituacio, kie ili ricevas ordonojn sen havi eblecon mem esprimi sian sinceran opinion aŭ fari ion kreivan. Ili sopiras pri neformalaj situacioj kun maksimumo da libereco. Al tiuj homoj ne parolu pri kongresoj kun densa programo, pri kotizoj, nek pri kluba vivo kun multaj sindevigoj, sed pri ferioj, turismo, libereco en la homaj rilatoj...

Ĉu ni provu varbi homojn, kiuj mem kutimas analizi situaciojn, ekvilibre kaj

konscie elektas inter ĉiuj eblecoj antaŭ ol ekagi? Tiam ni mem zorgu por senerara kaj ekvilibra, ĝusta inform-materialo.

Analizi antaŭ ol varbi

Antaŭ iom da tempo, mi parolis kun juna viro, kiu estas la animo malantaŭ novaj porstudentaj revuo kaj inform-foiro en Belgio. Post trijara ekzisto, ĉiuj kostoj de la revuo estas kovritaj per reklamoj, dum la informa borso fariĝis unu el la manifestacioj, kiuj ĝuas plej multan atenton de la amas-komunikiloj. Li konfesis al ni ke – antaŭ ol oficiale lanĉi la revuon – malgranda skipo uzis dum ok monatoj ĉiun liberan tagon por pristudi kaj priparoli ĉiujn imageblajn problemojn.

Flandra Esperanto-Ligo konsultis lin, ĉar ĝia estraro pensis pri perletera varbokampanjo por memstuda Esperanto-kurso. Anstataŭ doni konsilojn, li bombardis nin per demandoj: pri la aĝogrupoj, profesioj, socia stato, ambicioj, feriolokoj, legitaj gazetoj ktp de la homoj en nia adresaro. Al neniu el tiuj demandoj ni havis respondon. En tiu momento fariĝis klara por mi, ke ni ne estos pretaj por lanĉi grandan projekton kaj certe ne por elspezi monon por reklamkampanjo, ĝis ni sukcesos pli bone analizi la homojn, kiujn ni volas varbi.

Ivo Durwael
Estrarano pri Informado

Esperantologio:

Atentinda prezento

Antaŭ kelkaj monatoj ĉe la eldonejo Oxford University Press aperis angla-lingva studo pri "Ĉinio kaj internaciaj organizaĵoj".* La aŭtoro, Gerald Chan, juna esploristo en Ĉina Universitato de Hongkongo, prezentis kaj analizis la partoprenon de Ĉina Popola Respubliko en neregistaraj organizaĵoj dum la pasintaj du jardekoj. La organizaĵoj, kiujn li elektis, estas – en tiu ĉi sinsekvo – Internacia Olimpika Komitato, Internacia Konsilantaro de Sciencaj Unioj, Internacia Ruĝa Kruco, Universala Esperanto-Asocio, Internacia PEN kaj Azia-Pacifika Brodkasta Unio.

En la ĉapitro pri UEA, la aŭtoro skizas la historion de Esperanto en Ĉinio kaj poste montras la etapojn de la proksimiĝo al la internacia movado (reviviĝo de ĈEL post la "kultura revolucio", aliĝo al UEA en 1980,

reprezentiĝo en UK-oj, ricevo de la Pokalo Fyne en 1983, UK en Pekino 1986). Li karakterizas Ĉinion kiel "landon plej aktivan en la antaŭenigo de Esperanto" kaj proponas kiel unu el la klarigoj por tiu ĉi fenomeno la strebon de "kelkaj ĉinaj gvidantoj" helpi la landojn de la Tria Mondo en ilia lukto kontraŭ "lingva hegemonio kaj diskriminacio".

La aŭtoro, kiu siatempe intervjuis funkciulojn de ĈEL kaj de UEA, mem alproprigis al si la necesan scion por uzi ankaŭ esperantlingvajn fontojn. Rezulte, aperis atentinda prezento de la rilato de Ĉinio al UEA – kadre de studo, kies seriozeco garantias por ĝi favoran akcepton inter fakuloj.

Ulrich Lins

*Gerald Chan, *China and International Organizations: Participation in Non-Governmental Organizations since 1971*. Hong Kong, Oxford, New York: Oxford University Press, 1989. ix, 225 p. Bindita. Prezo ĉ. 90 gld. Unu ekzemplero haveblas de la subskribinto.

Ĉu vi aliĝos al la azia evoluo?

La 12-an de decembro finiĝis la unujara esplorvojaĝo de Joachim Werdin tra Azio. Dum 50 semajnoj la juna pola Cseh-instruisto vizitis Israelon (Telavivo, Hajfo, Jerusalemo), Turkion (Istanbul), Pakistanon (Karaĉio, Multano, Lahoro, Ravalpindio, Islamabado, Mario, Ĝelema), Nepalon (Katmanduo), Bharaton (Novdelio, Kalkato, Bangaloro), Malajzion (Koalalumpo), Singapuron, Papuon-Novgvineon (Portmoresbio, Madango), Tajlandon (Bankoko) kaj Vjetnamion (Ho-Chi-Minh-urbo, Hanojo). La legantoj de ESPERANTO povis regule informiĝi pri liaj spertoj kaj progreso. Nun venis momento por konkludoj kaj novaj planoj.

Ĉio, kion vi legos, koncernas nur tiujn landojn, kiujn mi vizitis. Mi supozas, tamen, ke kelkaj aferoj estas pli universalaj.

Unue tri faktoj:

1. Ĝenerale la vorto Esperanto ne estas konata. Nur kelkaj homoj iam aŭdis ion pri ĝi, kaj ili plej ofte havas falsan opinion pri la afero.

2. Esperantaj lernmaterialoj estas tute ne aĉeteblaj en la vendejoj: oni povas vidi ilin nur ĉe esperantistoj.


3. La angla lingvo estas preskaŭ ĉie la unua kondiĉo por profesia kariero. Ĝi estas necesa, se oni volas aktivi en internacia kampo. En kelkaj landoj ĝi

akceptas tiun kiel honoran gaston. Ili persone ne povas vojaĝi eksterlanden pro tro altaj vojaĝkostoj. Tiu izoliteco ne emigas al por-Esperanta agado.

Ĉio ĉi ne sonas optimismige, sed ĝi ne signifas, ke ni rezignu. Restas fakto, ke miloj (por ne diri milionoj) da homoj volas lerni Esperanton. Ili ŝatas la ideon kaj emas apogi la movadon. Estas ankaŭ pluraj personoj, kiuj volas labori por la afero sed bezonas gvidon kaj spertiĝon.

En tiu situacio, kie ekzistas malforta, malgranda E-movado unuflanke, sed aliflanke amasiĝas potencialaj fortoj kaj ebloj, ni bezonas ne nur bonan

*Ĉu Singapuro –
“tigreto” de la Azia
ekonomio – fariĝos
ankaŭ motoro de la
regiona E-agado?*



jam anstataŭis la gepatran lingvon eĉ en familiaj rilatoj.

En situacio karakterizita de tiuj tri punktoj, la diskoniganto de Esperanto demandas sin ofte: ĉu havas sencon daŭrigi tiun sizifan laboron?

Kelkaj kromaj faktoj:

En tiuj landoj estas malmulte da esperantistoj, kaj ilia nombro ne ŝanĝiĝas aŭ kreskas malrapide. Pro manko de bonaj, seneraraj lernolibroj kaj instruantoj, la lingvonivelo ĝenerale ne estas alta. La movadanoj ne havas multajn eblojn kontaktiĝi persone kun eksterlandanoj; malofte iu vizitas ilin, kaj tial ili kore kaj varme

strategion sed ankaŭ efikan organizadon, novajn agadmetodojn kaj ideojn, kiuj estu ligitaj al konkreta projekto kun financa bazo.

Fokusoj de la agado

Legante la artikolojn pri “esplorvojaĝo tra Azio” el la pasinta jaro, vi trovos ke taŭgaj projektoj jam ekzistas. Ekzemple, en Bangaloro (suda Bharato) ekestis E-centro post la fino de kurso por kvindek da homoj. En Koalalumpo (Malajzio) kaj Singapuro aperis landaj asocioj post similaj kursoj por respektive ĉ. 50 kaj 120 homoj. En Portmoresbio (Papu-

Novgvineo) kaj Bankoko (Tajlando) estas fonditaj respektive E-grupo kaj E-klubo.

En 1990 estas novaj projektoj realiĝantaj. Jen ili: organizi kursojn en Filipinoj, Honkongo, Tajvano kaj Indonezio (lokoj kie praktike ne ekzistas la movado); fondi E-organizaĵojn en tiuj landoj; fondi Azian Esperantistan Edukejon en (plej verŝajne) Singapuro; organizi seminarion pri la por-Esperanta agado en Azio; eldoni lernolibron kun kasedo por azianoj.

La realigo de tiuj projektoj okazos pli aŭ malpli rapide depende de diversaj faktoroj, precipe de la financa bazo.

Al vi la iniciato!

Pensinte profunde, nun respondu la demandojn:

- Ĉu estas grave, popularigi Esperanton en tiu mondoparto, kie loĝas pli ol 60% de la homaro?

- Ĉu vi volas kontribui al evoluigo de la azia E-movado?

Viajn respondojn volonte legos la artikolinto (adreso sube), same viajn demandojn, proponojn, kritikojn. Ekzempleroj de la raporto “Esperanto en Azio” estas mendeblaj ĉe li.

Pri financo ĉiu povas helpi sed nur malmultaj faros tion. De tiuj malmultaj dependos nia efikeco en Azio. Ĉu vi aliĝos? Vi povas pagi vian monon rekte al konto destinita por evoluo de la azia E-movado: United Overseas Bank, Account No. 101-148-219-3 Werdin, Singapore 0104.

Fine, jen adresoj de novaj E-organizaĵoj, por ke vi povu kontakti ilin kaj sekve kunlabori:

Bangalora E-Centro, c/o S.S. Pradhan, 97, 24th Cross, III Block East, Jayanagar, Bangalore, 560 011 Bharato (Hinda Unio)

Singapura E-Asocio, c/o Lee Kim Kiew, 11, Jalan Batu 04-152, 1543 Singapuro

Esperantista Klubo de Bangkok, c/o Pho Thamkhajadpaikum, 42, Areesamphan 5, Rama 6 Rd, Phyathai, Bangkok 10400, Tajlando

Malajzia E-Asocio, c/o Siva Dei, 42, Lorong Kampong Pandan, 55100 Kuala Lumpur, Malajzio

Esperantista Grupo de Portmoresbio, c/o John Shadlow, Geography Department, University of PNG, Box 320, University NCD, Papuo-Novgvineo

Joachim Werdin
Pionierów 6 A 9
PL-47-220 Kędzierzyn, Pollando

Landa agado:

Semoj en la sudo

Krom Zairio (vd. la januaran numeron), Philippe Chavignon vizitis plurajn aliajn landojn en la suda parto de Afriko dum la monatoj septembro ĝis decembro. Jen kelkaj notoj el lia vojaĝo.

Kongolando: asocio sen esperantistoj

En la ĉefurbo Brazavilo mi restis nur unu tagon, sed intervjuigis ĉe loka ĵurnalo kaj eksciis pri la ekzisto de "Association Congolaise d'Espéranto". Tiun asocion fondis Jean-Royal Kississou-Boma antaŭ unu jaro, post renkontiĝo kun UEA-estrarano Barbara Despiney ĉe Unesko. Lin mi bedaŭrinde ne povis renkonti, sed la asocio ĝis nun havas nur juran kaj administran ekziston, ĉar neniuj kapablaj paroli Esperanton. Kapablaj kaj kontaktindaj esperantistoj estas Malonga Matuba Ngingi kaj Jean-Claude Yengo, 93 rue Moukoundzi, Ngouaka, Arrondissement 1, Brazzaville.

Ruando: nur ĝermo, sed bonaj kondiĉoj

En Kigali, Paul Ngamara (Rwanda-petrolgaz, BP 1434, Kigali) gvidas kurson por 15 plenkreskaj lernantoj. Bedaŭrinde liaj lokaj subtenantoj reiris al Belgio: ĝemelado kun eksterlanda asocio aŭ klubo estus bonvena. Oficiala agnosko de la registaro estas atingata. Pro pli bonaj vivkondiĉoj kaj administrado de la lando, tiea landa asocio povus disvolviĝi pli memstare kaj sendepende.

Nur unu tagon mi pasigis en Burundio. Mi prelegis ĉe la Bahaa Centro en Bujumburo, kaj esperas baldaŭn naskiĝon de movado. Ankaŭ en Tanzanio mi vizitis la Bahaan Centron en Dar-Es-Salaam, sed pro rapida trapaso kaj malsaniĝo mi ne sukcesis viziti iujn esperantistojn.

Madagaskaro: amasa instruado, abundaj kvereloj

Mi pasigis iom pli ol unu semajnon en la ĉefurba regiono de la insulego. Ĉi tie la movado pro delongaj kvereloj ĉe la estraro de Malagasa E-Asocio kreskas neregule. Multaj malnovaj esperantistoj malaperis en la ĝangalon de la neesperantistoj. Tamen ne mankas atingoj. La amasa instruado organizita de CNELIE – centro en la ĉefurbo Antananarivo, kiun gvidas s-ro

Désirée Rabevazaha – estas frukto-dona kvante. Ĝi okazas en ŝtataj lernejoj, eksterprograme, laŭ permeso de la Ministro pri Edukado. Ankaŭ la instruantoj, el kiuj multaj estas junaj, viglaj membroj de Fiestama (la junulara E-organizaĵo de Madagaskaro), estas fervoraj kaj sindonemaj. Alia asocio, Universala Kultura Servo (s-ro Eugène Raveloson) instruas koresponde tra la tuta lando.

Dum mia restado mi vizitis plurajn Cseh-kursojn proksime de la ĉefurbo, intervjuigis ĉe ĵurnaloj kaj nacia radiostacio, kaj partoprenis en memorinda kampara ekskurso kun kvindekda membroj de Fiestama. Sed precipe mi laboris kun la gvidantoj de la malagasa movado por klopodi atingi minimuman kompromison inter ili rilate la estradon. Pro nekuraceblaj vundoj kaj malsamaj opinioj pri strategio estas pli bone, ke ĉiu laboru siaflanke kaj kunlaboru por rekonstrui, iom post iom, la landan asocion MEA laŭ plano jam proponita de UEA.

devas alfronti multajn komplikajojn (viziojn kaj aliajn permesilojn, monavidajn militistojn kaj policistojn, multekostajn flugbiletojn, prezojn ekspluatantajn la turistojn, lertajn ŝtelistojn en la urboj...). Ofte cerbumendas por transiri la regularajn kaj neregularajn barilojn. Laŭ miaj spertoj estas malkonsilinde por senspertaj vojaĝantoj alveni sola en tiaj landoj, precipe en Zairio.

Kiel progresi plu?

Krom subvencioj de UEA, granda helpo morala kaj materiala fontus el ĝemelado de kluboj kaj landaj asocioj. Klarigendas, ke materiala helpo por individuoj malutilas al la movado kaj ofte perdiĝas. Ĝi devas trafi nur la izolitajn esperantistojn en landoj, kie landaj asocioj ankoraŭ ne ekzistas. En aliaj landoj la helpo iru, interkonsente kun la landa asocio, al kluboj funkciantaj racie kaj konforme al la zamenhofa idealo.

Eblas ankaŭ, ke la Esperanto-

Germana E-Asocio lanĉas ĝemeladon kun Zairio

En la jarfina numero de sia organo *Esperanto aktuell*, la estraro de GEA invitas la okcidentgermanajn klubojn "ĝemeliĝi kaj amikiĝi kun E-klubo kaj grupoj de E-progresantoj en Zairio". La starigon de rilatoj kunordigas Elisabeth Schwarzer, etnologo kiu faris siajn doktorajn studojn en Niĝerio.

Similaj ligoj inter Eŭropo kaj Afriko ekzistas inter Svedio kaj Tanzanio, kaj inter Francio kaj diversaj franclingvaj landoj, precipe Togolando. Unuopaj kluboj en aliaj landoj ĝemeliĝis kun po unu ĝis pluraj afrikaj kluboj.

Kluboj aŭ asocioj kiuj deziras informojn pri la ĝemelagado kontaktu Hans Bakker, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG, Amsterdam, Nederlando.

Granda deziro de la malagasaj esperantistoj estas ke UEA faciligu okazigon de kongreseto por motivi la lernantojn kaj konvinki la aŭtoritatojn pri la seriozeco de Esperanto.

Vojaĝaj plusoj kaj minusoj

Mi opinias, ke la strategio de UEA en Afriko estas taŭga rilate la rimedojn disponeblajn. Se la vojaĝado de afrikanoj al Eŭropo estas necesa, ankaŭ gravas la vojaĝo de UEA-sendito al Afriko de tempo al tempo por sperti la realan staton de la movado. Tiaj rektaj kontaktoj povas evitigi miskomprenojn kaj ebligi al ĉiuj esperantistoj sperti la efikecon de Esperanto kun eksterlandano. Vizito de blankulo ankaŭ ege impresas la aŭtoritatojn kaj eminentulojn.

Mi tamen aldonu ke, kvankam la bazaj necesajoj de la vivo estas tre malmultekostaj, kiel eksterlandano oni

movado rolu kiel peranto inter neesperantistoj, kiuj volas helpi afrikanojn, kaj la ĉirkaŭaĵo de la afrikaj esperantistoj (vilaĝo, kvartalo...). Tio cetere plialtigos la reputacion de Esperanto antaŭ la publika opinio en ambaŭ lokoj.

En la landoj, kie la movado estas jam strukturita, amasinstruado estos ebla kiam la koncernaj asocioj kapablas funkcii kiel eble plej memstare kaj finance sendepende. Tio implicas, ke ili pagigu kotizojn al siaj membroj: necesas varbi i.a. en la pli riĉaj medioj. Pri alia ebla fonto de enspezoj mi povas atesti, ke en pluraj lokoj eblas kontentige gastigi vizitantojn. Esperanta turismo estus frukto-dona por la turistoj, por la afrikanoj kaj por UEA! Necesas baldaŭ fari la unuajn paŝojn sur tiu longa vojo al memstareco.

Philippe Chavignon

Reagoj

Ĝusta orientado

Temas pri afero, kiun verŝajne tre malmultaj legantoj rimarkis en la novembra numero de *Esperanto*. La sovetia mapo, kiu aperis sur p. 188 kaj enhavis ankaŭ limojn de sovetaj kaj aŭtonomaj respublikoj, estis de la kvindekaj jaroj.

En la mapo ne aperis la aŭtonomaj respublikoj de kalmukoj, ĉeĉeno-ingusoj ktp, kiuj estis forpelitaj al Siberio kaj Meza Azio dum 1944-56. Karelio (apud la finna landlimo) estis montrita per simila limo kiel la sovetaj respublikoj, kaj ĝi ja estis la dekseka sovetia respubliko dum la jaroj 1940-1956.

Tia malnova, Stalina mapo maluzendas en la revuo *Esperanto*, eĉ pli ĉar la artikolo temis pri la nuna Sovetio. Kiel mi komence diris, verŝajne neniu ĝin rimarkis kaj ĉiukaze la miso estas eta; tamen iu povus facile ofendiĝi pro tia mapo.

Jukka S... (nelegebla)

Red.: Vi pravas, kaj ni petas pardonon de niaj sovetiaj legantoj.

Preta por prunto

En sia artikolo (*Esperanto* 1989/190) s-ro Fjodorov mencias la neceson de "depon-centroj de vastatema esperant-lingva kaj nacilingva literaturo, kun nepre detala bibliografia inform-bulteno..."

Notindas, ke la Biblioteko Montagu C. Butler (adreso ĉe E-Asocio de Britujo) volonte akceptas ĉiajn eldonaĵojn kaj manuskriptojn en aŭ pri Esperanto. Duekzemplerajn eldonaĵojn ni kompreneble recenzigas; eventualaj triaj ekzempleroj aldoniĝas al nia pruntokolekto. La eroj de la pruntokolekto estas akireblaj pere de la interbibliotekaj pruntoretoj nacia kaj internacia.

Do la aŭtoroj dezirantaj diskonigi siajn manuskriptojn povas ne nur deponi ilin en nia biblioteko, sed ankaŭ, se ili tion petas, aldonigi ilin al la pruntokolekto. Ili aŭ sendu du ekzemplerojn, aŭ lasu, ke ni kopiu la manuskripton.

Regule ni kompilas laŭ-temajn listojn de la pruntokolektaĵoj, kaj tiuj listoj estas unuope aĉeteblaj, aŭ aboneblaj. Per tio la publiko povas scii kio estas disponebla.

La efektiva uziĝo de tiu ebleco do dependas unuflanke de la aŭtoroj kaj

aliflanke de la legema publiko: la tiucela mekanismo estas tute preta.

Geoffrey King (Britio)

Vortoza vulkano

Kun intereso kaj sento de simpatio mi legis la vortozan reagon de s-ro Aleksandr Fjodorov (novembro '89) al mia antaŭa reago (aprilo '89) pri lia manifesto, koncernanta precipe la savigan recepton de "kreado" (julio-aŭgusto '88).

Memkompreneble kolego Fjodorov respondas polemike al polemiko, kaj elmontras nekomunan kapablon lerte retoriki. Sed, ĉar li neniel kaj neniom dementas miajn tezojn kaj analizojn, mi taksas nenecese pludaŭrigi la debaton.

Cetere, eksciinte ke li estas nur 33-jara, mi emas pensi: se ni nur havus centojn da tiaj vulkane pensantaj kaj agemaj homoj (eĉ se iom nerealismaj)!

Do, ĉiu restu ĉe siaj opinioj; eble io stimula rezultos el ambaŭ.

Kaj kun la plej sinceraj bondeziroj por lia interesa kaj malstereotipa revuo *Survoje*.

Aldo de'Giorgi (Italio)

Kion fari?

En la novembra numero s-ro B. Wennergren admonis la redakcion pri malŝparo de valora spaco en "tiel grava revuo" por temo malgrava, nome: la Akademia decido pri landnomoj. "Ne kritiku! – uzu!" ordonis

li. Jen ekzemplo por ni ĉiuj – *Monato*. Agu kiel ĝia redaktoro! T.e., obeu. "Ĉu ni ne jam sufiĉe diskutis pri landnomoj?" Efektive – al ĉiuj tedis, tedegis la temo. La plej multaj esperantistoj simple acide grimacas, aŭdante pri "tiu tedaĵo". Laŭ mi, la temo tiom tedis plimulton de la akademianoj, ke ili simple ignoris ĝin kaj *lasis* solvon al grupeto de la akademianoj, por kiuj tiu temo estas "ŝatata ĉevaleto". Kaj la grupeto decidis por ĉiuj, anstataŭ ĉiuj. Kaj ni ne diskutu, diras al ni s-ro B. Wennergren. "Ekzistas pli gravaj aferoj por diskuti!"

Konsentite – ekzistas miloj da pli gravaj aferoj. En la sama numero Bertil Englund parolas ĝuste pri tio: esperantistoj verku por *Monato* ("kies enhavo estas tre riĉa" – konsentite!) pri gravaj politikaj kaj kulturaj eventoj, ne nur esperantumu. Sed jen la tubero en la afero: kion faru koreoj kaj ukrainoj, malakceptantaj la decidon de la Akademio pri iliaj landnomoj, kaj kies artikolojn "modela redaktoro" nepre "korektos"? Tre volonte mi ne parolos pri landnomoj! Pli valoras verki pri la popola movado por perestrojko en Ukrainio, pri ekologia situacio post la Ĉornobila katastrofo ktp. Mi do petas esperantistojn, kiujn ankoraŭ ne "ĝismorte tedis" la landnoma problemo, respondi mian demandon: kion fari? La demandon naskis ne simpla scivolemo, sed la reala problemo, kiu kaŭzis mian malverkemon. Antaŭ la Akademia decido *Monato* uzis la landnomon "Ukrainio", sed nun ĉiuj artikoloj estas "korektataj" (ekz. mia letero "Pri preteco por libero" en *Monato* 8/89).



Eĉ la britoj ekkonscias pri la neceso lerni fremdajn lingvojn, sugestas tiu ĉi karikaturo el la influhava ĵurnalo *Financial Times* (sendis: Hilary Chapman).



Recenzoj

Kiel kunlabori en tiaj kondiĉoj?

Pardonon pro eluzo de valora spaco. Sed, ŝajnas al mi, la landnoma problemo ne estas nur lingva problemo. La maniero de ĝia solvo kaj diskutoj pri ĝi elstarigis alian, laŭ mi, tre gravan demandon: kiaspeca komunumo ni estas? Ĉu tia, en kiu oni rajtas diskuti kaj libere esprimi siajn opiniojn? Aŭ ĉu nia tasko (de ordinaraĵ esperantistoj) estas nur obei, aŭskultante admonojn ke “*La sola praktika vojo al solvo estas ekuzo de la Akademio norma*”? Ĉu la nuna evoluo en Orienta Eŭropo ankoraŭ ne sukcesis montri al kelkaj esperantistoj, ke “la sola vojo” ĝenerale ne ekzistas? Kaj esprimoj pri “*neakcepteblaj*” komentoj ankaŭ ne taŭgas por nia (ĉu demokratia?) komunumo.

Olga Kerzjuk (Britio)

Seksismo en liriko

En sia recenzo pri *Desislava ridetas* de Giorgio Silfer (*Esperanto* 1989/194) Lozgaĉev skribas: “Amo al virino ĉiam estis la ĉefa motoro de liriko”. Tie li (verŝajne nekonscie) konsideras la aferon el vira vidpunkto. Tio validas nur por viraj poetoj. Por poetinoj (krom samseksamaj) la ĉefa motoro de liriko estas amo al viro.

Willem Verloren van Themaat
(Nederlando)

Pri la membrokampanjo

Kie ajn ekzistas pli da esperantistoj kaj simpatiantoj ol da UEA-membroj. Pro tio vi pravas lanĉante membrokampanjon. Ĉiuj UEA-membroj havas dekomence devon partopreni. Finfine, 7000 anoj estas ridinda nombro por la tuta planedo.

Do, la kvar UEA-delegitoj en Itabuna sendas cirkuleran leteron du-lingve – portugale kaj Esperante – al potencialaj membroj de UEA en nia urbo, precipe, kune kun fotokopioj de materialo pri la kampanjo.

Eble estus konvene ke UEA, pere de *Esperanto*, sugestu al la membraro fari tion. Ni sendas similan kopion al la brazila ĉefdelegito kaj al Brazila Esperanto-Ligo.

Por ke ni povu lanĉi duan etapon, estus bone ricevi de vi ĉirkaŭ 30 aliĝilojn kaj varbilojn anoncitajn en *Esperanto* 1989/p. 199.

Hilmar Ilton Santana Ferreira
(Brazilo)

Red.: Ni ricevis similajn pozitivajn reagojn el multaj landoj. En venontaj numeroj ni regule informos pri la progreso de la kampanjo kaj la kontribuoj de niaj membroj.

Jam la nomo de la aŭtoro vekas intereson. Memorinda poeto, populara romanisto, talenta pedagogo, elokventa argumentisto – Claude Piron jam ellaboris por si brilan reputacion. Sed per sia lasta verko li ekpaŝis sur danĝeran grundon. Ĉu bonas La bona lingvo? Jen du opinioj.

Profunda, tamen embarasa subjektivemo

La bona lingvo. Claude Piron. Vieno/Budapeŝto: Pro Esperanto/Hungara Esperanto-Asocio, 1989. 112p. 21cm. 14,10 gld.

Kiam la redaktoro de *Esperanto* petis min recenzi tiun ĉi novan libron de Piron, temantan pri la lingvo, kiun ni ĉiuj ja amas, mi tuj akceptis kun entuziasmo. Tiun entuziasmon mi ĝis nun ja ne perdis, sed mi tuj konfesu, ke la libro metis min en embarason, kiun mi bezonis semajnojn por solvi. Poŝtkarto de la redaktoro, post du monatoj, tamen sukcesis definitive agigi min, sed mi jam diru, ke miaj komentoj respegulas nur mian nunmomentan personan sintenon, kiu elkreskis el plurprova rekonsidero de la temo.

Nu, alvenis la libro kaj mi ĝin tra legis unustreĉe, kaptita de ĝiaj klara stilo kaj emocia forto. Mi tamen ne povis ne eksenti ian maltrankviliĝon, kaŭzitan de la potenca subfluo de subjektiveco, kiu grandparte portas la kaptopovon de la teksto. Samtempe mi ja konstatis la honestan volon de la aŭtoro provi objektivi kaj kun profunda intereso mi observis lian argumentadon por pruvi sian koncepton pri la “spirito” de la “bona lingvo” per faktoj surbaze de la eblecoj, kiujn liveras la strukturo de Esperanto por krea esprimado. Sed mi ne povis eviti tiun timon, kiun plie nutris refoja tralego de la libro: Ĉu tiaspeca konflikta prezento de persona konvinko pri la “bono” de Esperanto povas helpi al la esperantistoj pli klare koncepti sian sintenon al la lingvo? Ĉar ja temas pri konflikto inter emo subjektiva kaj emo objektiva, kiuj ie kaj tie strebas renkontiĝi en ia justemo, lokiĝanta sur filozofia tereno, sen multa konvinko.

Jen ekzemplo: surbaze de iama eldiro de G. Waringhien, ke vortoj prefiksitaj de *mal* ne estas “sufiĉe elvokantaj” en poezio, Piron, draste

konkludinte ke “nur persono ne sentanta Esperanton, kia ĝin sentas la plimulto el la ordinaraĵ uzantoj, povas tion skribi”, rapidas serĉi ian justeman ekvilibron en demando nur nebule respondebla: “Aŭ ĉu mi estas maljusta? Ĉu ni ĉi tie trafas unu aspekton, fojfoje tragikan, de la homa estado, nome, ke homoj povas tiagrade malsami en sia maniero percepti la mondon, ke tio, kio evidentas al unu, estas nevidebla al la alia?”

Piron provas pravigi sian subjektivemon per la ĝenerala aserto, ke en diskutoj pri lingvoj objektiveco “aperas neebla”. Ĉi tiun aserton li bazas sur siaj observoj “de pluraj jardekoj”. Sendube li pravas, se temas pri diskutoj pri lingvaj uzoj radikigantaj en personaj, familiaj aŭ klasaj medioj. Tamen ŝajnas ne multe valida tia argumento koncerne *duan* lingvon, plej ofte lernatan post plena akirado de la unua lingvo. Mi havas fortan dubon pri tio,

“Ni bezonas pliajn tiajn esplorojn kaj konkretajn elĉerpojn el la profunda fonto de la ekzistanta lingva materialo.”

ke Esperanto, eĉ la “reala lingvo” kiun Piron tiel forte advokatas, estas same “interplektita kun primitivaj sentoj kaj emocioj kuŝantaj tre profunde en ni” kiel estas kredeble la lingvo akirata ekde frua infanaĝo. La diskutoj okazantaj pri Esperanto inter la esperantistoj ne rilatas al “nia konscio pri ni mem kaj pri nia identeco”, sed al tro insista alteniĝo al la propraj opinioj

pri tio, kiel la lingvo evoluu aŭ estu evoluigata. Tia "insista altenigo" emas bari la vojon al konstrua interparolo pri la lingvo, ĝiaj kapabloj kaj bezonoj.

Persone, mi havas la konvinkon, ke tiuj homoj, kiuj plej multe eksperimentas pri neologismoj en sia krea verkado nuntempe, havas ankaŭ profundan respekton por la kreiva potencialo de Esperanto kaj agnoskas la eblecon elserĉi elvokivajn esprimojn el ĝiaj strukturaj rimedoj. Tion oni ja povas konstati en iliaj verkoj, originalaj kaj tradukitaj, kvankam ŝajnas, ke nur la novismoj frapas la okulojn de multaj legantoj. Same, mi volas kredi, ke la pli konservativaj uzantoj de Esperanto estas potenciale pretaj akcepti neologisman uzon en arta kunteksto kaj eĉ agnoski ĝian eventualan neceson, malgraŭ sia principa fundamentismo. Ambaŭ "partioj" certe havas komunan terenon, kiun ili devus laŭeble plivastigi per seriozaj eksperimentoj, esploroj kaj sobraj agnoskoj.

Kaj efektive, malgraŭ sia grandparte subjektiva, eĉ ataka, tono, la libro de Piron alportas multan gravan materialon en formo de esploro pri la ena potencialo de Esperanto. Li ekzemple klopodas objekte difini la "spiriton" de la lingvo surbaze de la unikeco de ĝia strukturo. Tie li nomas kvin faktorojn, kiujn certe ĉiuj esperantistoj akceptas: neŝanĝeblon de la vortelementoj, senbaran povon ilin kombini, emon al formaĵoj simplaj kaj koncizaj, elvokadon prefere ol difinado (ekz. *sinĝenema* ktp anstataŭ ekz. *timida*), eblon per-finaĵe alsigni al iu ajn vorto iun ajn gramatikan funkcion, kio igas la esprimon laŭvole analiza ("li iris al la hotelo per taksio, li taksii hotelen, li iris hotelen taksie"). Li atentigas ankaŭ pri tio, ke Esperanto mirinde kunigas rigoran disciplinon (pere de la gramatikaj finaĵoj) kaj fekundigan liberon (pere de neordinare fleksebla vortordo ebligata de la rigoro de la vortfinaĵoj, kaj pere de la libera kombineblo de vortelementoj). Ĉi tiun kombinon de rigoro kaj libero Piron konsideras psikologie bona, kiun aserton mi komprenas tiel, ke la strukturo de Esperanto kongruas kun la bezono de la homo por orda flekseblo.

La detala pritrakto de Piron de la unika kreopovo de Esperanto surbaze de ĝia struktura karaktero estas valora kontribuo al la esplorado de la lingva potencialo kaj meritas senrezervan laŭdon. Ni bezonas pliajn tiajn esplorojn kaj konkretajn elĉerpojn el la profunda fonto de la ekzistanta lingva



materialo. Sed, kompreneble, la "spirito" de Esperanto certe ne estas plene klarigebla surbaze de la lingvostukturo sola. "Spiriton" de lingvo konstruas ankaŭ, kaj verŝajne multe pli, ĝia krea uzado tra la tempo kaj ĝia historio. Daŭra kreskado de la vortaro havas ankaŭ tie influon, ĉar ĝi kontribuas al tiu uzado, tiu historio. Ekzemple, la siatempaj neologismoj de Kalocsay havas rolon kaj valoron en tia kunteksto.

Piron evidente konsideras sian libron samtempe defendo kaj atako kontraŭ ĉiaj tendencoj plivastigi la vortprovizon de Esperanto el ekstere, precipe en la komuna kaj la arta lingvo-

stiloj. Miaopinie li tamen ne pritraktas la temon sufiĉe science, t.e. el lingvistika vidpunkto. Ekzemple estas lingvistika principo, ke lingvo ne longe toleras du absolutajn sinonimojn. Preskaŭ ĉiam okazas, ke unu aŭ elfalas aŭ alprenas nuancan signifon, ofte apartastilan. Tio certe okazos kaj verŝajne jam okazas en Esperanto rilate sinonimajn vortoparojn kiel *mallonga/kurta* (kiu jam emas signifi "abrupta" rilate al "respondo"). Se tia nuanciĝo ekestas, tio estas en si mem pliriĉiĝo en la lingvo.

Tiu ĉi nova libro de Claude Piron estas unuavice ege interesa persona dokumento havanta kaj la fortajn kaj malfortajn flankojn de tiaspeca verko. Neniu povas dubi pri la sincera sinprezento de la aŭtoro, kaj li substance kontribuas al profunda pritrakto de la karaktero de Esperanto. Mi tre esperas, ke precize tiu kontribuo povos servi katarse (t.e. emocipurige) al multaj legantoj, ĉu neologismemaj, ĉu konservativemaj. Tre povas esti, ke ni ne estus ekhavintaj tian valoran kontribuon, se ne estus ĝin motorinta la subjektivemo de nia ŝatinda Piron. Tiel ofte funkcias la paradoksoj en nia vivo.

Baldur Ragnarsson (Islando)

Lanco por la Zamenhofa lingvo

Oni ne devas voli serĉi en *La bona lingvo* science komponitan traktaton. Oni trovas en ĝi iom da ĉio: de la plejbono ĝis kelkaj eraroj, kiujn, kun iom pli da atento, Claude Piron certe povus eviti. Restas tamen ke *La bona lingvo* estas atentinda kaj atentenda libro. Ĝi pli memorigas pri pentraĵo de impresionisto ol pri lekcio de universitata profesoro: unu penikaĵo tien ĉi, alia tien, kaj subite, antaŭ ol oni komprenas kio okazas, ekstaras antaŭ oniaj mirantaj okuloj tuta pejzaĝo, kiu surprizas ne nur per sia arteco, sed ankaŭ per sia klareco kaj precizeco.

Kun la lerteco de vera artisto, Claude Piron kondukas nin tra la Esperantia ĝardeno, tra ĝia labirinto, aŭ pli ĝuste tra la perdita Edeno... sed, kiel ĉiu impresionisma artaĵo, *La bona lingvo* estas nedisigebla de la persono de sia aŭtoro: en tiun libron Claude Piron metis multe (tro multe, eble diros kelkaj) de si mem. Li efektive rakontas kiel li, naŭjara knabo, ekkonis kaj lernis Esperanton kaj uzis ĝin, en ĝia vera ideala pureco, kun sia frato, sed ankaŭ kiel li suferis kiam li unuafoje

eniris la landon Esperantio, kun ĝiaj malvastaj ideoj, ĝiaj rivalaĵoj, ĝiaj malamoj de malamikaj fratoj. Tre juna knabo, li komencis korespondi kun ĉina knabo kiu enkondukis lin en sian propran lingvon: la komparo de la ĉina kaj de Esperanto montris al li la veran naturon de Esperanto, tiun pri kiu parolis Zamenhof en sia Unua Libro, sed kiun preskaŭ neniu esperantisto atentis. Tion faris la juna Claude Piron kaj oni povas kompreni lian koleron kiam li malkovris kion la Esperantaj teoriuloj faris el la simpla, genia kreaĵo de Zamenhof.

Mi mem bone povas kunsenti kun li, ĉar mia propra historio estas tute simila al lia: kiam mi unuafoje renkontis la Plenan Gramatikon kaj la Plenan Ilustritan Vortaron min kaptis la sama sankta kolero: mi eĉ estis pli radikala, ĉar mi tute forlasis Esperanton por reveni al ĝi nur post multaj jaroj. Kaj mi konas pli ol unu esperantiston kiu havis la saman reagon kaj eĉ neniam revenis al Esperanto.


Oni do ne povas surpriziĝi se Claude Piron tute honeste diras kion li opinias

(kun multaj aliaj) pri Waringhien aŭ Kalocsay kaj pri ilia fatala influo sur la lingvo.

Tiaj eŭropaj gramatikistoj, kiuj ĝenerale malmulte aŭ eĉ nenion scias pri izolaj lingvoj – kiaj estas la ĉina aŭ la malaja – sed ricevis formadon (por ne diri misformadon) klasikan, vidas Esperanton tra la okulvitroj de la klasika (greko-latina) gramatiko adaptita (nur Dio scias kiel!) al la aliaj eŭropaj lingvoj, kaj volas perforti ĝin aldevigante al ĝi ideojn, kutimojn, regulojn kiuj al ili ŝajnas esti tute evidentaj (aŭ “logikaj” kiel diras kelkaj el ili), sed kiuj estas al ĝi fakte tute fremdaj. Tiuj samaj gramatikistoj, absolute ne sciante kial la tiel nomataj aglutinaj lingvoj ricevis tiun nomon (kvankam la hungara estas konsiderata kiel aglutina) inventis, surbaze de supraĵaj karakteroj, la absurdan ideon ke Esperanto estas aglutina, kiam ĝi estas nur kungluema. La fakto ke Esperanto, kiel multaj tiel nomataj izolaj lingvoj (la vorto mem, kvankam tradicia, ne plaĉas al mi: oni eble devus paroli pri izolmonemaj lingvoj), kungluas siajn elementojn, ne faras el ĝi aglutinan lingvon. Aglutinaj lingvoj estas io tute alia, kiel montras iliaj *sintaksaj* kaj *morfologiaj* strukturoj. Esperanto estas izola lingvo en fleksiaj vestoj. Tiuj kiuj tion ne komprenas bonvolu nur legi la antaŭparolon de Zamenhof al sia Unua Libro.

En sia libro Claude Piron neniam uzas la terminon “izola lingvo”. Sed tio, kion li nomas la “reala lingvo” estas *nenio alia ol normale uzata izola lingvo*, en kiu ĉiu elemento (monemo) estas memstara. Fakte, tion li diras, per aliaj vortoj, sur paĝo 80: “Mia opinie, nia *bona lingvo* strukture unikas per la kunagado de kvin faktoroj: neŝanĝebleco de la vortelementoj; senbara povo ilin kombini; emo al formaĵoj simplaj kaj koncizaj; elvokado prefere ol difinado, tamen kun atento al la neceso sufiĉe precizi; eblo por finaĵe alsigni al iu ajn vorto iun ajn gramatikan funkcion, kio igas la esprimon laŭvole analiza... aŭ sinteza...” Estus malfacile glosi “izolan lingvon” pli klare kaj pli ekzakte.

Unu trajto de Esperanto, pri kiu Claude Piron speciale insistas, estas la monemo *mal*, kiu laŭ li estas vera beno. Li ilustras sian sintenon per multaj ekzemploj (p. 41 k.s.), kaj ne malkaŝas la koleron, kiun estigis en li certaj asertoj (en *Parnasa gvidlibro*) de Waringhien, kiun li akuzas, tute prave laŭ mi, ne “senti” Esperanton (p. 77, l. 11). Tio ŝuldiĝas, li pensas, al la



franca kartezia eduksistemo kiu disvolvas en juna franco lian rezonemon pli ol lian sentemon, kaj do, en lingvaj aferoj, lian emon al difinado pli ol lian emon al elvokado, alivorte la emon precizigi malfavore al la emo ĝeneraligi. Tie ĉi oni ne rajtas forgesi ke izolaj lingvoj estas esence *elvokaj* lingvoj, dum fleksiaj (kaj ofte aglutinaj) lingvoj ĝenerale estas difinaj. Estas do tre malfacile, eble eĉ ne eble, por franco, parolanta terure precizeman,

“Tro da esperantistoj havas la tendencon konsideri la Plenan Gramatikon (aŭ ĝian pli novan formon PAG) kaj la PIVon kiel seneraran Biblion, kiam ili estas nur la respegulo de la penso de unu franco kaj unu hungaro, kiuj, erarigite de sia propra klasika formado, volis altrudi al Esperanto regulojn kaj strukturojn validajn nur por eŭropaj fleksiaj lingvoj.”

difineman lingvon kaj konanta neniun alitipan lingvon, bone kompreni la veran strukturon de Esperanto. Tiu nekapablo estas la bazo mem de la eraroj de la Varengjenoj, Kaloĉaĵoj, Mimooj kaj aliaj Ŝulcoj de Esperantio.

Alia aspekto sur kiu Claude Piron speciale insistas estas la fakto, bone konata de ĉiu *vera* lingvikisto, ke la vortoj de iu ajn lingvo preskaŭ neniam precize respondas al tiuj de alia. La volo de kelkaj esperantistoj (speciale francoj kaj germanoj) altrudi al Esperanto novajn vortojn ekzakte tradukantajn naciajn vortojn de iliaj lingvoj estas ne nur nerealaj revaĵoj, sed eĉ vera minaco por Esperanto. Sur tiu tereno, li provas montri la danĝeron de certa neologismemo konstatebla ĉe multaj nunaj verkistoj kaj de la nun ankoraŭ tre forta tendenco adopti grekajn vortojn ofte ne kompreneblajn por neeŭropanoj.

Tio estas la motivo pro kiu li klare deklaras ke li estas pli “elinternisto” (komprenu, pli-malpli, “skemisto”) ol “eleksteristo” (legu “naturalisto”) kaj defendas sian tezon ke lingva riĉeco kaj precizeco ne signifas multnombreon de vortoj (aŭ radikoj). Malfeliĉe ankaŭ tie ĉi liaj ekzemploj ne estas tute ĝustaj. (Vidu sur p. 53 la liniojn koncernantajn la francan vorton *crier*. Mi pensas ke sen longe serĉi iu ajn klera franco kapablas tuj trovi almenaŭ dek vortojn aliajn ol *crier* por esprimi similan ideon.)

La libro finiĝas per diversaj interesaj konsideroj pri la relativa beleco kaj estetika valoro de vortoj kaj esprimoj laŭ la kunteksto, interalie surbaze de tradukoj de la fama poemo de Verlaine: “Chanson d’automne”.

Estas tiom en la libro de Claude Piron ke oni dezirus skribi pli pri ĝi, sed se mi tion farus tiu ĉi recenzo fariĝus tiel longa kiel *La bona lingvo* mem kaj mi volas lasi al la legantoj, kiuj espereble estos tre multaj, *ĉar la libro estas riĉiga kaj senhezite rekomendinda*, la plezuron malkovri ion mem.

J.-F. Farjon de Lagatinerie
(FR Germanio)

En formo de postskribo:

Kiam mi jam estis fininta tiun ĉi recenzon, mi ricevis *Esperanto Aktuell*, organon de Germana Esperanto-Asocio, en kiu estas publikigita skandala artikolo de Bernard Golden. Mi ne volas ĉi tie paroli pri tiu teksto, kiu estas vera vangofrapo al tolerema homo kia estis Zamenhof, sed mi pensas ke la ekzisto de tiaj esperantistoj, *tute speciale en la Akademio*, jam estus sufiĉa motivo por skribi libron tian, kia *La bona lingvo*. Ni do danku al Claude Piron pro la lanco rompita por la vera zamenhofa Esperanto!

Epoko revenis sub niajn okulojn

La Esperantisto. Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto, 1889-1895. Postparolo de Reinhard Haupenthal. Hildesheim, Zürich, New York: Georg Olms, 1988. 802p. ISBN 3-487-09062-7. 24cm. Bind. 240,00 gld.

Dum longa tempo ĉi tiu gazeto ŝajnis kvazaŭ fantomo. Pri ĝi ĉiu sciis aŭ povis ekscii el esploroj pri la historio de Esperanto, sed praktike neniu vidis ĝin. En Ruslando, kie ĝi iam havis tri kvaronojn de la abonantoj, la gazeto estis malpermesita de la cara cenzuro; jardekojn poste sur la movadon falis la batoj de stalinismo, kiu pereigis multajn esperantistojn-veteranojn kaj kun ili la restintajn kompletojn en Ruslando. Ĝis antaŭnelonge mi ne konis eĉ unu plenan kolekton tie.

Nun la gazeton fotokopie reeldonis la konata eldonejo Georg Olms, al kiu ni ŝuldas siatempan revenigon de aliaj grandaj raraĵoj – la *Bibliografio de Internacia Lingvo* de P. Stojan (1929, reeldonita 1973) kaj la *Historio de la universala lingvo* de L. Couturat kaj L. Leau (en la franca, 1903, reeldonita 1979).

Kia estis la rolo de *La Esperantisto* en la tiutempa historio de Esperanto, kaj kian rolon ĝi ludos nun, post sia reapero?



Oni scias, ke ĉi tiun unuan gazeton Esperantan eldonis en Nürnberg la tiea mondlingva klubo, antaŭe volapükista, sed poste forlasinta Volapükon. Se la klubo estis embrio de esperantista organizaĵo nacia, la gazeto estis embrio de internacia reto de esperantistoj kaj tiel kontribuis al translimigo de Esperanto.

La gazeto fakte ne nur diskonigis la lingvon mem: jam per sia titolo ĝi faris tutmonde konata ties novan nomon – Esperanto. Ni ne forgesu, ke Esperanto aperis sub la nomo “Internacia Lingvo”, kaj la adeptoj de la lingvo komence nomiĝis “internaciistoj” aŭ

“internaciuloj”. En septembro 1888 Zamenhof penis komenci eldonadon de la gazeto en Ruslando ĝuste sub la titolo “La internaciulo”. Tiel, inter septembro 1888 kaj septembro 1889 la lingvo alinomiĝis, prenante sur sin la pseŭdonomon de sia kreinto. Oni povas hipotezi, ke tiu alinomiĝo okazis pro la specifaj kondiĉoj de la frua Esperanto-movado.

En septembro 1889 Zamenhof ricevis la cenzurpermeson eldoni la adresaron de la unua milo de esperantistoj. Laŭ la kalkuloj de A. Holzhaus (vidu la postparolon de R. Haupenthal al la nuna represo de *La Esperantisto*), el tiu milo 919 estis rusujanoj. Kaj tio verŝajne klarigas, kial al Esperanto alĝuiĝis nova nomo. En la rusa lingvo la substantivoj normale havas kazdeklinton, tamen la vorto Esperanto estas escepto – ĝi ne deklinablas. Tial la nominativo “Esperanto” sonas tute same kiel genitivo “de Esperanto”, kaj la vortkombino “lingvo de (Doktoro) Esperanto” povas esti (kaj estis!) facile miskomprenata kiel “lingvo (nomiĝanta) Esperanto”. Do, la alinomiĝo de Internacia Lingvo al Esperanto okazis pro lingva eraro en la rusparolanta medio, kaj la revuo, portante la lingvon ekster la limojn de Ruslando, kunportis ankaŭ ties novan nomon kaj fiksas ĝin internacie.

Tre signifa estas ankaŭ la tempo, kiam aperis *La Esperantisto*: septembro 1889. Ĝi estis verŝajne la plej maltrafa momento por enmondigi novan lingvon internacian. En aŭgusto 1889 en Parizo okazis jam la 3-a internacia kongreso de volapükistoj, al kiu venis reprezentantoj de multaj landoj, eĉ de Ĉinio kaj Turkio. Ŝajnis ke Volapük definitive certigis por si la rolon de tutmonda komunikilo. Pri kio do povis revii esperantistoj? Necesis firme kredi, ke malgraŭ ĉiuj sukcesoj de Volapük ĝi tamen spertos fiaskon, kaj Zamenhof esprimas tiun kredon en la artikolo, al kiu estas dediĉitaj la unuaj numeroj de *La Esperantisto*. La artikolo nomiĝas “Esperanto kaj Volapük”, kaj estas la sola kontribuo de la aŭtoro de Esperanto al “kompara interlingvistiko” – la kompara studo de planlingvoj.

De la vidpunkto interlingvistika estas interesa ankaŭ la projekto enkonduki reformojn en Esperanton, publikigita de Zamenhof mem (ŝajne kontraŭvole) en *La Esperantisto* en la

jaro 1894. Pri la projekto okazis voĉdonado de la abonantoj de la revuo, kun negativa rezulto por la reformpropono, kaj favora ĝuste al la tradicia Esperanto. Tiel Esperanto estis savita... kaj estus interese scii, kiuj estis la savintoj? Nun dank’al la reeldono de *La Esperantisto* oni povas detale esplori ĉiujn donitaĵojn pri la voĉdonado kaj voĉdonintoj, kun ties adresoj. Kaj oni venos certe al surprizaj konkludoj pri la voĉdonado, tiom dise kaj mise prezentita en la esperantologia kaj interlingvistika literaturo. Laŭ miaj kalkuloj, la plejparto de la voĉdonintoj por la reformoj estis germanoj, kaj la plejparto de la voĉdonintoj kontraŭ estis rusoj.

“...eĉ satiristo trovos por si sufiĉe da materialo, ĉar li ekĝuos vidi la fontojn de pli postaj (kaj nunaj) kritikindaĵoj en la Esperanto-movado...”

Do ĝuste tiu rusa majoritato “savis” Esperanton. Ĉu ili tion faris pro sia konservemo? aŭ pro lingvistika indifereco? aŭ pro pigra maldeziro denove ellerni la reformitan lingvon? aŭ... pro sia saĝeco? La kampo por esploristoj estas nun vaste malfermita.

La Esperantisto certe altiros la atenton ne nur de interlingvistoj. Literaturisto trovos tie la unuajn komunajn provojn evoluigi la lingvon kiel beletran esprimilon; sociologo esploros, kiel formiĝis la socia bazo de Esperanto en diversaj landoj; kaj eĉ satiristo trovos por si sufiĉe da materialo, ĉar li ekĝuos vidi la fontojn de pli postaj (kaj nunaj) kritikindaĵoj en la Esperanto-movado (fanfaronemo, naiveco, supertaksado de siaj fortoj, “grava venko”, “sankta afero” ktp, ktp).

Sed ĉu ne pleje gajnos la ordinara leganto, trafolumante kaj tralegante tiun pezan volumon, kiu plene konservis la aromon de la epoko – kun “novaĵoj”, kiuj tiam vere estis novaj, kaj kun la nomoj de homoj, tiam tre junaj en la tre juna movado. Zamenhof mem estis nur 29-jara, kiam *La Esperantisto* komencis aperadi. Kaj tiun junan ardon daŭre elradias la paĝoj de la reveninta revuo.

Sergej Kuznecov (Sovetunio)

Nekrologoj

Wilfred M. APPLEBY (1892-1989), delegito en la angla urbo Cheltenham de 1931 ĝis 1987, mortis en majo pasintjare.

Zoltan N. BOGLARI (1922-1989), dumviva membro de UEA, forpasis la 30-an de majo en Manzini, Svazilando, kie li estis la delegito kaj laboris por starigi Esperanto-centron. Li postlasis materialojn por Esperanta-zulua-svatia-angla vortaro.

D-ro Ortwin BRODT (1916-1989) mortis la 27-an de novembro en Neu-Anspach, FRG, kie li estis delegito kaj fakdelegito pri lingvistiko. Eminenta pedagogo kaj gimnaziestro, li ĉefredaktis *Germana antologio* (1985).

Carl-Erik CARLSSON (1912-1989) mortis la 21-an de septembro en Vara, Svedio. Li estis la delegito tie kaj en Stora Levene dum pli ol 35 jaroj.

Grigor G. CHOUTOFF (1906-1989), dumviva membro de UEA, forpasis meze de la pasinta jaro en Maabarot, Israelo. Li estis fakdelegito pri kibucoj (aŭ "kolektivaj kolonioj") de post 1945.

D-ro Szymon DATNER (1902-1989) forpasis la 8-an de decembro en Varsovio, Pollando. Li estis unu el la ĉefagantoj de Zamenhofa Esperanto-Societo en Bjalistoko en la dudekaj kaj tridekaj jaroj. Post la dua mondmilito li dediĉis sin al esplorado de naziaj krimoj en Pollando, verkante centojn da studoj kaj 18 librojn. Li estis ankaŭ elstara konanto kaj aktivulo de la juda kulturo.

Ellen EGGERS (1907-1989), regula membro de Societo Zamenhof kaj partoprenanto en preskaŭ ĉiuj Universalaj Kongresoj de post 1959, forpasis la 19-an de oktobro en Hamburgo.

ESUMI Noriya (1912-1989), delegito en Kameoka de 1965 ĝis 1982, forpasis fine de la pasinta jaro. Dum multaj jaroj li laboris ĉe Oomoto, interalie kiel estro de la Eksterlanda Fakoj kaj sekretario de Esperanto-Propaganda Asocio.

D-ro Víctor Manuel GONZÁLEZ (1907-1989) mortis antaŭ nelonge en Monterrey, Meksikio, kie li estis delegito, fakdelegito pri pediatrio kaj konata Esperanta radio-amatoro.

Erling A. HAUGEN (1910-1989) mortis fine de la pasinta jaro en Trondheim, Norvegio, kie dum preskaŭ

kvindek jaroj li estis vicdelegito kaj fakdelegito pri revizio. Liaj tradukoj de la versdramoj de Henrik Ibsen – *Peer Gynt* (1951) kaj *Brand* (1978) – estas konsiderataj majstroverkoj.

D-ro Guido HOLZ (1920-1989), delegito en Leutkirch im Allgäu, FRG, mortis frue en 1989. Li estis aktiva tradukisto de religia fakliteraturo kaj de poezio; post lia morto aperis antologio el tiu lasta, *Tra(nskon)dukoj* (Armin Gmeiner 1989).

Victor JANHEIM (1910-1989), fakdelegito pri abelkulturo en la sveda urbeto Kungsör dum pli ol 40 jaroj, mortis frue en la pasinta jaro.

Edla NILSSON (1910-1989), dumviva membro de UEA kaj regula membro de Societo Zamenhof, mortis aŭguste en Malmberget, Svedio. Ŝi testamentis i.a. al Sveda E-Federacio kaj al UEA.

Akiko Ŭusink-Nagata (1936-1990)

Neatendite, la 13-an de januaro 1990, forpasis kunlaborantino de UEA kiu dum la pasintaj dudek jaroj kvazaŭ personigis internaciismon por ni. Socia kaj movada aktivulo en Japanio kaj Nederlando, Akiko Ŭusink-Nagata dediĉis sian vivon al la kreo de unueca mondo.

Jam de frua aĝo Akiko Nagata konceptis sin mondcivitano. Ankoraŭ en japana mezlernejo, ŝi gajnis premion en monda eseo-konkurso pri la Pacarmeo de Unuiĝintaj Nacioj. En 1967 ŝi fariĝis fakdelegito pri mondfederismo en sia hejmurbo Sapporo, kie la sekvan jaron ŝi kunorganizis la japanan Esperanto-kongreson.

Fine de aŭgusto 1968, Akiko Nagata ekdeĵoris en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Tie ŝi kunlaboris pri kvar eldonaĵoj, kiujn UEA tiam produktis: la Jarlibro, *La praktiko*, *La monda lingvo-problemo*, kaj precipe pri *Esperanto*, kiun ŝi redaktis (sub Victor Sadler) de oktobro 1970 ĝis aprilo 1973.

En 1972 Akiko Nagata edzigis estraron de UEA, Evert J. Woessink, kaj transloĝiĝis al Arnhem, 200 kilometrojn for de Roterdamo. La ĉiutaga veturado igis ŝin cedi pri sia posteno en la CO, sed ne ĉesigi sian kunlaboron. Dum pli ol dek jaroj ekde

Javad RAFI-ZADEH SHAHI (1933-1989), dum pluraj jaroj la delegito en Teherano, Irano, mortis en julio 1989 post longa malsano.

Antonio RIBEIRO DA CRUZ (1907-1989), dumviva membro de UEA kaj la delegito en Damaia dum trideko da jaroj, mortis pasintjare en Amadora, Portugalio.

Marguerite SCHWARTZ, multjardeka membro de UEA, forpasis la 3-an de decembro 1989 en Courbevoie, Francio. Ŝi estis la vidvino de aŭtoro Raymond Schwartz, kaj aktive partoprenis en liaj du kabaredoj sub la nomo Marga Rineta.

S-ro W. SPAANDER (1908-1989), dumviva membro de UEA, fakdelegito kaj regula membro de Societo Zamenhof, mortis meze de la pasinta jaro en Amsterdam, Nederlando.


D-ro Rómulo ZEBALLOS MORALES (1907-1989), la ĉefdelegito de UEA en Urugvajo dum pli ol 30 jaroj, mortis antaŭnelonge en Montevideo.

aprilo 1976 ŝi redaktadis la bultenon *UN kaj ni* pri la eksteraj rilatoj de UEA. Dum la sama periodo ŝi aktivis en la nederlanda movado, interalie instruante Esperanton en popoluniversitato kaj oficante du jarojn kiel prezidanto de Nederlanda Esperanto-Asocio (1977-79). Apartan intereson ŝi ligis al la ekesto de Eŭropa Esperanto-Unio. Dum la sama periodo ŝi aŭtoris japanlingvan libron pri Nederlando, kaj aperigis tradukon el ainaj popolfabeloj, *Ambaŭ mamoj de la monto Porosir* (1975). Ŝi estis dumviva membro kaj regula mecenato de UEA.

Dum la lastaj jaroj Akiko Ŭusink-Nagata ofte atentigis la movadon pri troa eŭropeco en la lingvo-uzo. Pasiĉe kaj prave kontraŭante la "eŭropan dialekton", ŝi pledis por ekstreme skemisma stilo, interalie per vaste diskutita referaĵo en la Esperantologia Konferenco de 1986 (parte represita en *Esperanto* 1986/p.212). Cetere, *Mondo kaj ni*, kiel ŝia bulteno renomiĝis en 1988, estis kvazaŭ elprovejo de tiu stilo. Verŝajne la aŭtorino mem konfesus, ke ŝia sennaciismo foje kondukis ŝin al eksceso. Sed ĝi donis ankaŭ direkton al ŝia tuta vivo, alportante grandan profiton al la movado kaj ĉiuj, kiuj konis ŝin.



Laste aperis...



Ausführliche Sprachlehre des Esperanto (1932). Hermann Göhl (1859-1931). Berlin: Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR, 1989 (3-a eldono). 295p. 20cm. "La plej detala germanlingva gramatiko." 29,40 gld.

Bestidoj kaj iliaj patrinoj. G'jang Jiming. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 18p. 20x18cm. Kolorilus. Infanlibro. 3,00 gld.

Freneza tago, La, aŭ La edziĝo de Figaro, parto 1 (1784). P.-A. Caron de Beaumarchais (1732-1799). El la franca trad. Hervé Gonin. Paris: UFE, 1989. 58p. ISSN 0775-7698. 21cm. Antologieto de la franca literaturo. La unuaj du aktoj de fama franca komedio, kiu miksas am-intrigon kun revolucia pledo por libero. 8,10 gld.

Granda aventuro, La, kaj aliaj noveloj (1945). Ferenc Szilágyi (1895-1967). Postparolo de Vilmos Benczik. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1989 (2-a eldono). 151p. 21cm. Esperantaj klasikaĵoj 3. ISBN 963 571 264 2. Variaj rakontoj de notinda prozisto, realisme bonhumoraj, malgajaj, satiraj kaj tragediaj. 16,50 gld.

Imperio de l' koroj. Du poemaroj. Julius Balbin. Pizo: Edistudio, 1989. 237p. ISBN 88-7036-037-1. 20cm. Bind. Tre variaj poemoj, multaj inspiritaj de travivaĵoj en la naziaj koncentrejoj, aliaj pri la Esperanta aŭ usona medioj de la aŭtoro. 30,00 gld.

Kancero kaj ekologio. Vido al estonteco. Maurice Touchais. El la franca

trad. R. Laval. Laroque Timbaut: SAT-Broŝurservo, 1989. 62p. 20cm. Ligoj inter kancero kaj la varmigo de la atmosfero pro troa energiuzado. 6,00 gld.

Larmoj de Ifigenino, La. Petro Anselmo. Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1989. 43p. 21cm. ISBN 3-922570-62-3. Postvivanto de ŝiprompiĝo en 1763 rakontas pri siaj spertoj sur Pacifika insulo. 6,30 gld.

Lingvo kaj logiko. Albert Goodheir. Glasgow: Kardo, 1989 (2a eld.). 14p. 21cm. Konkize traktas i.a. la rilaton lingvo-realo, metaforojn, frazojn, genron, negacion. 3,00 gld.

Mago, La. Agregajoj kaj pantunetoj. Rikardo Ŝulco. Paderborn: Esperanto-centro Paderborn, 1989. 213p. 21cm. Ilus. ISBN 3-922570-61-5. Fiksformaj versaĵoj pri plej diversaj temoj, apud sugestiaj desegnaĵoj de la aŭtoro. 24,60 gld.

Optimisto-biblio, La. Karlo Bolo. El la germana trad. Hermano Bermano. Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1989. 163p. 21cm. ISBN 3-922570-58-5. Ilus. Konsiloj kaj aforismoj pri diversaj homoj sentoj, spertoj, aspiroj ktp. 22,20 gld.

Orienta speciala diina masaĝo. Masayuki Saionji (1943-). Pekino: Akademia Eldonejo Xue Yuan, 1989. 191p. 19cm. Ilus. ISBN 7-80060-461-6. Ilustrita manlibro pri "koksosto-ĝustiga prem-kneda terapio", sistemigita de la aŭtoro el la tradicia masaĝ-arto. Apendico donas ekzer-

cojn por la propra korpo. 27,60 gld.

Rakonto komenciĝanta per ter-pomoj. Masaĵi Iŭakura (1903-). El la japana trad. Sejŝro Nomra. Numazu: Biblioteko Kolombo, 1989. 91p. 18cm. Du rakontoj por geknaboj, pri la vivo en Japanio dum la militisma periodo. 8,40 gld.

Urseto ekkonis sian eraron. Lin Song-jing. Ilus. Li Ĝŭoji. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 18p. ISBN 7-5052-0010-0. 20x18cm. Malbonkondukta urseto lernas esti ĝentila. 3,00 gld.

Vi povas morti nur dufoje. István Nemere. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1989. 183p. ISBN 963 571 2863. 20cm. Flua kaj streĉa krimromano, sekvo al "Vivi estas danĝere". Danny Skagen celas venĝon... 21,00 gld.

Wakajtapu (1984). Jo ŝa Horvat (1915-). El la serbokroata trad. Zlatko Tišljarić. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1989. 134p. 17cm. Infanromano pri la serĉo al scio kaj feliĉo en fabela Pacifik-eca mondo. Brila traduko respegulas brilan originalon. 12,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

La 18-an de decembro okazis lanĉo en la Hungara Kulturcentro en Helsinko de LA FINNA VOJO en Esperanto kaj la hungara. De dekstre: la tradukinto Osmo Buller, hungara ambasadoro Árpád Hargita, kaj la filo de la aŭtoro, Matti Kekkonen.



Foto: Eino Kaikkonen

• **La finn-ugra vojo:** Lastnumere ni anoncis la aperon de libro pri la ekstera politiko de Finnlando, *La finna vojo*, verkita de la multjara prezidento de Finnlando, Urho Kekkonen, kaj tradukita de Osmo Buller (nun la ĝenerala sekretario de UEA).

Foliume

• **Budapeŝta informilo:** Ne nur *Esperanto* eniris la novan jaron sur novaj flugiloj: ankaŭ la konata hungara revuo ŝanĝis la aspekton kaj – pli funde – la aperritmon. Per 24 numeroj jare ĝi forprenos de *Heroldo* la titolon "Plej ofta gazeto de la Esperanto-movado". La redakcio promesas aperigi informojn ene de 15 tagoj, substrekante ankaŭ, ke BI volas fariĝi "servo-gazeto", kiu donos specialan atenton al aferoj kiel korespondado, komerco, turismaj kaj kulturaj aranĝoj. La abontarifo restas sama: 30 gld. pere de UEA; perantoj estas serĉataj, precipe en okcidentaj landoj. Proponojn, informojn sendu al poŝtfako 193, H-1368 Budapest, Hungario.

La E-traduko servis kiel ponto al hungara versio *A finn út*, farita de István Ertl, kiu jam aperis ĉe HEA kun antaŭparolo de notinda politikisto Imre Pozsgay. Ankaŭ en Finnlando tio vekis atenton (foto).

• **Por instruistoj** *Internacia pedagogia revuo* proponas interesajn informojn kaj foje polemikajn debatojn. La ĉi-numera artikolo de Ernő Csiszár estas nur unu ekzemplo; alian vi povas trovi en numero 3/89, kie A.A. Núñez komentas pri tezaro de F.G. Blázquez: "...tia maniero esplori, kaj ankaŭ [lia] artikolo, estas fuŝa, sterila kaj steriliga por nia afero". Kial? Abonu IPR kaj eltrovu mem: nur 15,00 gld. pere de UEA. Kaj konsideru, ĉu viaj lernantoj ne profitus el regula ricevado de *Juna amiko*, vigla revueto kies enhavo povas amuzi kaj kapti ankaŭ la ne-tiom-junajn. Kiu ŝatas la scenejan stilon de redaktoro Stefan MacGill, tiu trovos similan plezuron en la kantoj, rakontoj, enigmoj, raportoj, desegnetoj kaj similaj, per kiuj li kaj aliaj plenigas la paĝojn. Pensu, ke 4122 abonantoj en 33 landoj ne povas malpravi! 8,40 gld. ĉe UEA.

• **Soveta Uzbekistano** (aŭ Uzbekio, kiel ni preferus), monata ilustrita revuo pri la sovetia respubliko kiu iam rolis kiel granda krucvojo de la transaziaj karavanoj, aperigas jam de du jaroj Esperanto-rubrikon sub prizorgo de E. Perevertajlo. La rubriko aperas senŝanĝe en ĉiuj 11 lingvo-eldonoj, kaj altiris en la pasinta jaro pli ol 300 leterojn. Mendu vian propran ekzempleron el la lingvoj angla, franca, germana, hispana, rusa, uzbeka, araba, persa, hindia, daria kaj urdua, menciante samtempe la E-rubrikon, ĉe: Soveta Uzbekistano, Lenin-str. 41, SU-700000 Taŝkent.

• **Jugoslavia stelo** feliĉe pli funkcias ol la duone-ekzistanta Jugoslavia Esperanto-Ligo, kies oficiala organo ĝi estas. Tra 1989 la revuo sukcesis atingi kaj teni vere novan nivelon sub redaktoro Senad Čolić – des pli impona atingo, kiam oni konsideras la ekonomian staton de la lando. Ne nur jugoslaviaj sed ankaŭ balkanaj kaj mondaj temoj estis traktataj, sur 12 grandaj paĝoj trimonate: la nealiancaj landoj, kunlaboro en Balkanio, afrika agado, turismo kaj scienco, kaj morda recenzo pri la 73-a UK (pli proksimaj aranĝoj estas kutime "brilaj"!). La revuo serĉas abonantojn (20 gld. pere de UEA) kaj perantojn (skribu al *Jugoslavia stelo*, D. Ozme 7/iv, YU-71 000 Sarajevo).

• **Bona espero** estas ĝuste tio, kion oni ricevas el la tria, junula numero de la sudafrika E-revuo en 1989. Esperanto-Klubo Surmonteta, ĉe la Universitato de Kaburbo, decidis trakti ne Esperantajn temojn ("bedaŭrinde – sed pri kio skribi??"), sed okazaĵojn en la sudafrika vivo. Tiel oni povas legi pri la sperto voĉdoni en la unua Namibia baloto; pri lingvistika vojaĝo en Kaprivo, landstrio inter Bocvano, Zambio, Namibio kaj Zimbabvo; pri partopreno en protestoj kontraŭ plaĝapartismo; kaj pri volontula laboro en la apudurbaj getoj. La rezulto: numero kiu katenas la atenton. Interesatoj skribu al la klubo p/a SRC, Green Level, UCT, 7700 Rondebosch, Sudafriko.

• **Ĉeĥoslovakio**: Fondiĝis en Prago E-kooperativo "Interhelpo", kiu okupiĝos precipe pri E-turismo kaj lingvoinstruado. Skribu al Esperanto, Pk. 44, CS-150 00 Praha 5.

• **Francio**: De la 20-a de decembro, ĉiuj loĝantoj de Francio povas informiĝi pri Esperanto per la telefon-datumbanko Minitel. Unuiĝo Franca por Esperanto prizorgas sep rubrikojn por la servo: kio estas E-o, kie kaj kiel lerni ĝin, tutmonda korespondado, internacia turismo, renkontiĝoj kaj aranĝoj, lingvostaĝoj, korespondaj kursoj.

• **FR Germanio**: Germana E-Asocio, laŭ lastatempa numero de ĝia organo *Esperanto aktuell*, klopodos respondi al la politikaj sanĝoj en centra Eŭropo per kunlaboro en la solvo de financaj problemoj por vojaĝemaj orientaj esperantistoj. La asocio jam havas kontraktojn kun la ĉeĥa kaj hungara asocioj pri "sendeviza interŝanĝo". Ĝi nun celos plivastigi tiun sistemon al la ceteraj najbaraj orientaj landoj.

• **Pakistano**: La 12-a Pakistana E-Kongreso okazis fine de decembro en Multan, kie troviĝas la centra oficejo de PakEsA – aliĝinta al UEA ĉe la 74-a Universala Kongreso en Braĵtono. La asocio lanĉas ĉi-jare "Kampanjon de Komunikado" sub la prizorgo de Muhammad Naeem Javaid, koncentrante sian atenton al la universitatoj. Jam en la Agrikultura Universitato de Faisalabad okazas kurso por sesdeko da lernantoj.

• **Pollando**: UEA-vicprezidanto Roman Dobrzyński propravole forlasis la prezidantecon de Pola E-Asocio en la lastatempaj elektoj. Ĉar ne troviĝis alia kandidato, E-radiisto kaj akademiano Andrzej Pettyn okupos tiun postenon ĝis majo, se necese pli longe. Vicprezidantoj fariĝis lingvisto Ryszard Rokicki kaj la estro de Esperantotur, Andrzej Grzębowski. Ĝenerala sekretario estas Wiesław Tomaszewski. La 15-persona estraro enhavas i.a. novan deputiton de la Pola Parlamento, s-inon Wanda Sokołowska.

• **Sovetunio**: El la informoplena cirkulero de Junulara E-Centro Taŝtagol, *Eksciuke...*, ni ĉerpis jenajn novaĵojn. Laŭ SEU-prezidanto Vladimir Samodaj, *Moskvaj novaĵoj* ja komencos aperi (supozeble




Foto: A. Sochacki

La neĝa metodo: anoj el tri polaj junularaj E-klubo lernas kaj amuziĝas en januara renkontiĝo.

• **Germana DR**: Meze de januaro okazis elekto – per sekreta voĉdono – de nova estraro de GDREA. La postenon de prezidanto transprenis d-ro Ronald Lötsch, renoma lingvisto en la fakoj lingvopolitiko kaj slavistiko, kiu ankaŭ kungvidis la rondan tablon pri interlingvistiko ĉe la lasta Monda Kongreso de Lingvistoj. Lia lingvisto-kolego d-ro Detlev Blanke reelektiĝis kiel ĝenerala sekretario per 35 voĉoj el 36.

• **Israelo**: Kvardeko da israelaj esperantistoj gastis la 9-an de septembro ĉe la Universala Domo de Justeco, ĉefsidejo de la bahaa religio en Haifa. Sekve de tio komenciĝis E-kurso por 25 lernantoj en unu el la bahaaj oficejoj, sub prizorgo de ĉefdelegito Jehoŝua Tilleman.

monate) en Esperanto, aŭ sub plena prizorgo de SEU aŭ kiel komuna entrepreno de SEU kaj la MN-redakcio. Samodaj denove eniris la popularan revuon *Eŝo planety* en oktobro, ĉi-foje sur la unua paĝo, klarigante la aliĝon de SEU al UEA kaj aliajn lastatempajn novaĵojn. Sesa E-klubo fondiĝis en Moskvo kaj ricevis propran ejon en la fama ĉefstrato Arbat. En Lviva E-Centro (Ukrainio) laboras 15 homoj plentempe kaj keldek partempe, partnere i.a. kun kelkaj lokaj kooperativoj kaj la pola Esperantotur. Simila konfederacio troviĝas en Leningrado sub la nomo Internacia Scienc-Produktada Unuiĝo "Konkordo". Tiu reklamis korespondan E-kurson tra tuta Sovetunio je granda kosto.



• **Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino:** AIS subskribis interkonsenton kun la Teknika Universitato en Bjalistoko, Pollando, cele al starigo tie de AIS-filio. La kontrakto cetere donis bonvenan apogon al la preparoj de E-Centro Zamenhof, kiu disponigos parton de la spaco en sia unua konstruaĵo al AIS. La 3-an Polan AIS-Sesion, kun ĉeftemo "ekologio", organizas en Bjalistoko d-ro Tyburcysz Tybłewski (18-25 februaro): skribu al li ĉe Bartka Zwycięzcy 11/1, PL-58-500 Jelenia Góra. La filia adreso: AIS, ul. Wiejska 45a, PL-15-351 Białystok.

• **Bibliografio:** Denove aperis ampleksa bibliografio pri esperantologio kaj interlingvistiko en la vaste uzata referencilo de Modernlingva Asocio de Usono (eldono 1988). La rubrikon, kiu ampleksas pli ol 300 artikolojn kaj librojn el la jaroj 1987 kaj 1988, kompilis Humphrey Tonkin.

• **Blinduloj:** Komenciĝis la 24-a jaro de Agado E3, la nederlanda E-organizaĵo por helpo al blinduloj en la Tria Mondo. Iniciatinto Jacques Tuinder pludonas la alvokon de nikaragva esperantisto: La organizaĵo Kristana Medicina Agado bezonas US\$15 000 por rekonstrui kvin okul-klinikojn, detruitajn en la pasintjara uragano. Sendu donacojn, kunlaborproponojn al Henegouwenlaan 35, NL-1966 RH Heemskerk, Nederlando (pbk 10 20 100).


Agado E3 cetere serĉas esperantistajn oftalmologojn por partopreni en la 58-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, Sarajevo, Jugoslavio, komence de aŭgusto. La celo estas, ke tiuj partnere kun jugoslavaj kolegoj faru internacian esploron pri la stato de la okulkuracado en tiu parto de Eŭropo.

• **Esperantologio:** Denove okazos internacia seminario en la konataejo en Bad Saarow, GDR, ĉi-foje pri la temo "Esperanto – objekto de akademia instruado kaj esploro". Inter eblaj temoj, depende de la deziroj de la partoprenantoj, estas: E-kursoj en altlernejoj, disertacioj, altlernejaj metodiko kaj instruiloj, rolo de landaj movadoj, internacia planado kaj kunordigado, rolo de la Akademio, CED ktp... Datoj: alveno 27 aprilo, foriro 2 majo. Petu informojn, aliĝilon de GDREA, O.-Nuschke-Str. 1, Berlin, DDR-1080.

• **Filozofio:** Filozofia Asocio Tutmonda iĝis sendube unu el la plej aktivaj kaj internaciaj fakaj asocioj de la movado. Lastatempa numero de ĝia revuo *Simpozio* raportas interalie pri laboro super Leksikono de Filozofio (ĉ. 2000 terminoj en deko da lingvoj), tradukoj de *Respubliko* kaj *Leĝoj* de Platono, *La kategorioj* de Aristotelo, *Filozofia vortaro* de Voltero, kaj pri

kontaktoj kun ĉinaj filozofoj. Anoncu vian interesiĝon ĉe Evaldo Pauli, Cons. Mafra 176, BR-88000 Florianópolis, Brazilo.

• **Fiŝkaptado:** Juna tanzania instruisto-esperantisto (vd. foton) volas ludoni, ripari kaj eble eĉ produkti fiŝretojn. Kiu ajn profesia helpo, konsilo, kontaktigo kun aliaj profesiuloj estus bonvena; temas pri retoj 100 m x 2 m, kun truoj de 3 1/2 cm. Skribu al Mwalimu Charles Kimweri Hiza, Pangani Primary School, PO Box 77, Pangani, Tanga, Tanzanio. ("Mwalimu" estas svahile: instruisto.)



• **Informado:** En numero 6/1989 de la dumonata revuo *Language International* (Lingvo Internacia) aperis dupaĝa artikolo pri la 74-a UK, verkita de la LKK-ano pri informado, Will Green.

Plenkoloraj terglobaj etiketoj mendeblas esperantlingve de Paul Hoffman, Earth Seals, PO Box 8000, Berkeley, CA 94707 Usono. Ili montras la vidaĵon el lunraketo en decembro 1972. Ses kostas US\$1, 200 kostas US\$25 ktp, plus US\$2 por afranko; indiku "Apollo 17 (Eo)" kaj la fonton de via informiĝo.

• **Komunikado:** Sekve de la interesiĝo de membro, UEA petis kaj ricevis pliajn detalojn pri la tekstoprogramo Afralpha, kiun Unesko evoluigis por faciligi la tajpadon kaj presadon de afrikaj lingvoj. La norma alfabeto Afralpha mem ekzistas jam de 1978: ĝi aldonas al la 26 bazaj latinaj literoj 24 specialajn literojn, kiuj kune ebligas fonetike skribi ĉiujn afrikajn lingvojn. La programo, distribuita al ĉiuj Ŝtatoj-Membroj de Unesko, uzas la komputilan lingvon Postscript por ebligi al ĉiu uzanto de mikrokomputo kaj lasera

printilo produkti tekstojn en kiu ajn afrika lingvo. Oni atendas ke tiu teknologio estos beno por multaj lokaj ĵurnaloj tra la kontinento, kaj ankaŭ por afrikaj lingvistoj.

• **Lingvoj:** La Konsilio de Eŭropo lastatempe starigis komitaton de ekspertoj por la elformulo de Eŭropa Ĉarto de Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj. La baza celo de la Ĉarto estos doni protekton al neŝtataj lingvoj kaj bazon por ilia evoluigo. Inter la observantoj ĉe tiu komitato, plejparte ŝtataj reprezentantoj, troviĝas la Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj (vidu la artikolon en *Esperanto* 1989/p.126-7).

• **Literaturo:** Internacia literatura konkurso "La blanka kolombo" invitas konkursaĵojn en la branĉoj poezio (inter 18 kaj 140 versoj), mallonga rakonto (inter 60 kaj 300 linioj) kaj eseo (inter 60 kaj 300 linioj), pri la temoj paco, amikeco, amo kaj interkompreniĝo inter la popoloj de la mondo. La verkoj devas esti originalaj kaj neeldonitaj, nepartoprenintaj en aliaj konkursoj, kaj tajpitaj je duobla interlinio. Subskribu per pseŭdonimo, kaj kunsendu nomon kaj adreson en fermita koverto. Sendu sep ekzemplerojn ĝis la 30-a de marto laŭ poŝta stampo al: Maja Gorova, str. San Stefano 23 A, BG-1504 Sofia, Bulgario. La premioj inkluzivas tritagan restadon en Sofio okaze de la arta E-festivalo "La blanka kolombo", 5-6 majo 1990.

• **Muziko:** En Zairio aktivas minimume tri Esperantaj muzik-grupoj je duon- aŭ plene profesia nivelo. Ni jam havis okazon menci la grupon en Kisangani, sub gvido de Lufimpu Lukolama, kaj tiun en Boma, en kiu ludas Mafuila-Tunga Mavomo. Lastatempe la grupo "Universo" en Kinŝaso laŭ instigo de Tufuene Mafuila ŝanĝis sian nomon al "Esperanto-Muziko", signale la fakton, ke ĝi nun kantas plejparte en Esperanto. Ĉiuj tri grupoj deziras disvastigi sian muzikon pere de sonbendoj, kaj bonvenigas kontaktojn kun alilandaj muzikistoj. La adresoj: BP 409, Kisangani (Haut-Zaïre); BP 34, Boma-II (Bas-Zaïre); p/a Bonkufu-Bobandida, BP 1028, Kin-aero (Kinshasa).

• **Naturkuracado:** Promesplena estas la evoluo de Esperantista Naturkuracista Asocio, kiu nun havas sesdekon da membroj en 25 landoj. Antaŭ nelonge aperis la tria numero de *ENA-informilo*, kun artikoloj i.a. pri neortodoksaj aidosoterapioj, spiradaj ekzercoj, masaĝo, kuracreptoj kontraŭ tabaksklaviĝo ktp. Membro (ankoraŭ nur US\$2) ĉe d-ro Puramo Chong, CPO Kesto 3047, Seoul 100, Koreio.

• **Poezio:** La 8-a Internacia Poezia Konkurso "Massimiliano Kolbe" havas denove E-sekcion. Konkursaĵojn pri ajna temo, ne pli longajn ol 60 versojn, sendu en ses kopioj (indiku sur unu el ili nomon,

pseŭdonomon kaj adreson) al la sekretario, Via Tapparelli 15/4, I-12038 Savigliano (CN), Italio, por atingi lin ne pli malfrue ol la 28-an de februaro.

• **Speleologio:** La Kuba Speleologia Societo anoncis al la organizantoj de la 75-a UK sian deziron starigi rilatojn kun la Esperantista Speleologia Fakgrupo, kiu onidire fondiĝis en 1987 kun membroj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hispanio, Hungario, Rumanio kaj Sovetunio. Bedaŭrinde UEA tute ne havas informojn pri tiu grupo. Ĉu iu el niaj legantoj-speleologoj povas doni novaĵojn pri ĝi?

• **Teozofio:** Kvarpaĝa artikolo pri Esperanto kaj homaranismo aperis en la novembra numero de la revuo de la Usona Teozofia Societo. Aŭtoro John Algeo konkludis, ke "Esperanto devus plaĉi al teozofoj".

• **Vortaroj:** Poligloto-esperantisto Lucjan Paff dediĉis la lastajn 12 jarojn al la kompilado de plurlingvaj vortaroj kaj turismaj helpiloj, surbaze de lingvistikaj studoj kaj sia propra kono de naŭ lingvoj. Li pretas disponigi siajn materialojn al ĉiuj E-asocioj, kaj petas la alsendon de pliaj dulingvaj vortaroj por E-o kaj diversaj naciaj lingvoj. Lucjan Paff, Monteverde 3955, RA-1636 OLIVOS, Buenos Aires, Argentino.

Persone

• **Lins:** "Esperanto estas komunikado kaj komunikado estas libero" estis la kerno de la parolado de UEA-vicprezidanto Ulrich Lins ĉe la inaŭguro de Zamenhof-monumento en Sabadell, Hispanio, la 17-an de decembro. Ĉirkaŭ 200 esperantistoj partoprenis la inaŭguron, plus simila nombro de neesperantistaj urbanoj. La parolado de Lins samtempe servis por lanĉi la membrokampanjon de UEA, kiun prizorgas E-Centro Sabadell (foto).

• **Von Waldowski:** La 1-an de decembro s-ino Margarete von Waldowski, esperantisto el Bonn, FR Germanio, festis sian 100-an naskiĝtagon. Membroj de Germana E-Asocio, inkluzive de ties prezidanto Wolfgang Schwanzer, vizitis por gratuli ŝin. S-ino von Waldowski partoprenis en la 13-a Universala Kongreso en Prago, 1921, kaj dum multaj jaroj estis aktiva movadano en Berlino.



Kampanjolanĉo en Sabadell: de maldekstre, Jordi Carbonell (prezidanto de Kataluna E-Asocio), Manuel Casanoves, Ulrich Lins, Llibert Puig (prezidanto de E-Centro Sabadell) kaj Josep Ma. Serrano.

Oficiala informilo

CENTRA OFICEJO

Ekde la 2-a de januaro laboras parttempe en la Centra Oficejo John Rapley. Li okupiĝas pri kongresa librotenado kaj administrado. John estas fakte malnova konato, ĉar li oficis en la CO inter 1983 ĝis 1986.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

AMIKOJ (minimуме \$10): Usono: Janice M. Atkinson.

SOCIETO ZAMENHOF 1989

Francio: André Morineau; Eloï Thiollière; Gaston Waringhien.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilo: J. C. Dorini Ramos. Hispanio: E. Collignon; J. Camacho. Italio: P. Cerretini.

DONACOJ 1989 (gld.)

ĝis la 31-a de decembro

FONDAĴO AFRIKO: Finnlando: T. Österman 250,00. Nederlando: W. P. Roelofs 500,00; S.A.K.v.d. Zee 100,00. Sumo ĉi-jara 19 087,34.

FONDAĴO AZIO: Sumo ĉi-jara 56,70.

FONDAĴO CANUTO: Finnlando: T. Österman 208,46. Francio: G. Waringhien 39,00. Nederlando: I.M.J. Dijkhoff-Lenze 100,00; R. Slot 200,00; S.A.K.v.d. Zee 50,00. Sumo ĉi-jara 5 162,02.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): Francio: G. Lagrange 100,00. FR Germanio: Esperanto-Blindenverband 200,00. Hispanio: J. F. Sotera 50,00. Hungario: K. & I. Ertl 50,00. Jugoslavio: S. Štimec 50,00. Kanarioj: F. J. Davila Dorta 100,00. Sumo ĉi-jara 1 670,00.

FONDAĴO ENCIKLOPEDIA: Sumo ĉi-jara 20,00.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Sumo ĉi-jara 5 000.

ASOCIA KAPITALO: Sumo ĉi-jara 1 071,00.

ĜENERALA KASO: Britio: M. Jelfs 19,36. Finnlando: T. Österman 500,00. FR Germanio: H. Bily 73,28; M. Gröndler 27,06. Irano: M. H. Saheb-Zamani 500,00. Japanio: T. Yamada 41,71. Nederlando: R. H. Bossong 16,00; Y. Weidema 45,00; E. M.

Maasbommel 150,00; I.M.J. Dijkhoff-Lenze 100,00; A. W. Treurniet 31,00. Svislando: H. De Sassi 11,23; W. Schaufelberger 24,97, Lina Jüstrich 24,97. Diversaj malgrandaj 26,57. Sumo ĉi-jara 15 719,35.

PROPAGANDA KONTO: Anonima donaco 1253,90. Sumo ĉi-jara 1 253,90.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Sumo ĉi-jara 817,42.

FONDAĴO TEJO: Nederlando: E. M. Maasbommel 150,00; J. Dunnewold 43,00. Sumo ĉi-jara 372,05.

FONDAĴO WÜSTER: Anonime 780,67. Sumo ĉi-jara 11 727,33.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Sumo ĉi-jara 50,00.

ĈINIO: Sumo ĉi-jara 1 077,66.

TRIA MONDO: Sumo ĉi-jara 6 280,45.

ESPERANTO-CENTRO BIALYSTOK: Sumo ĉi-jara 977,94.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Internacia komerca-ekonomika vortaro de Munniksma k.a. Bonstatan brokantan ekzempleron serĉas Klaus Schubert, Verlengde Hoogravenseweg 38, NL-3525 BG Utrecht, Nederlando. Bv. skribi kun prezpostulo.

Por konatigi Esperanton, sendu bele afrankitajn bildkartojn al: Esperanto-klubo, 5 rue Teinturiers, F-42100 Saint-Etienne, Francio. Respondon al ĉiuj.

Lufimpu Lukolama sciigas sian novan adreson: Kisangani Esperanto-Klubo, BP 409, Kisangani (Haut-Zaïre), Zairio.

50-jara eksedzino, ne belulino, sufiĉe bone kuiras, serĉas afablan edzon. Bonvolu skribi al Eva Tomson, Pk. 52, SU-203170 Haapsalu, Estonio (USSR).

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respond-kuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.

Anoncetoj

Mi serĉas bonan belan junulinon (kun bildo), kiu konsentos ke dua lingvo de nask. estos Esperanto. Josef, Pk. 556, Jerusalem, Israelo.

Kardo reeldonis *Forkaptita* de R. L. Stevenson. GBP 4,80. 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE, Skotlando.

La vicestro de la Liceo en Lomé, Togolando, tie diligente eklernis Esperanton, nur deĵoras en alia liceo. Leteroj estos bonvenaj al: Sossou Dotsè Ganke, Censeur du lycée de Tsevie, BP 53, Tsevie, Togolando.

Mi volas korespondi kaj interŝanĝi p.m., speciale akvofalaj bildoj, broŝuroj, prospektoj aŭ revuoj. Mehmet Telyakar, Aydinlik Sokak No. 23, Ortaköy, Istanbul, Turkio.

Por starigi reton kaj kunlabori, mi petas reeĥi hundobredistojn. G. Jemeljanov, Pk. 75, SU-332319 Melitopolj, Sovetunio.

SERĈATAJ:

INSTRUISTOJ AŬ ALIAJ PERSONOJ

komprenantaj la eblecojn de komputiloj en instruado; prefere konantoj de la lerneja vivo en siaj respektivaj landoj; volantaj komerce kunlabori por iom adapti, memstare enmerkatiĝi kaj vendi komputilan instruprogramon, ĝis nun sukcese elproviditan pri geografio, sed kun pluraj aliaj eblecoj. Vin anoncu al:

Unifax Software
Anisstigen 8
S-611 45 Nyköping, Svedio

Ĵus aperis: Jubilea Kolekto 4

TREZORO

La Esperanta novelarto

Du volumoj, entute pli ol 900 paĝoj.
69,00 gld. Sesona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Nobelpremio pri literaturo 1989:

Camilo José Cela

La familio de Pascual Duarte

el la hispana tradukis Fernando de Diego

Ĝuu en Esperanto unu el la ĉefverkoj de la moderna mondliteraturo: aŭdacan kaj krudan bildigon de la primitiva kampara socio, en 1942 frapintan Hispanion kiel fulmo el nigra ĉielo. La intensa penetremo kaj homkompreneo de la aŭtoro vekis vastan admiron.

Eldonis Barcelona Esperanto-Centro, 1985. 166p.
Ilustris Joan Carles Magria. UEA-prezo: 18,00 gld.

ALVOKO AL INTERESITOJ

Por ricevi – senpage – Esperantajn broŝurojn pri Bibliaj temoj, ankaŭ studkurson, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 28 Partis Way, Bath BA1 3QG, Britio**, bv. menciante ref. JEB 101.

Jen ĝi estas – la longe atendita libro:

MEMORLIBRO

GRAZ 1987

LA INTERNACIA JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO CENT JAROJ DE ESPERANTO-KULTURO

Ampleksa raporto pri la plej grava kultura evento en 1987, enhavanta:

1. la lastajn paroladojn de Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj de D-ro Paul Neergaard;
2. superrigardon de la 100-jaraj kulturaj atingoj. Lekciistoj: Albault, Régulo Pérez, Gacond, Marjorie Boulton, Ragnarsson, Neergaard, de Zilah, Mayer, Thierry, Zelazny, Lapenna;
3. rezoluciojn, fotoreportaĵon ktp.

Eldonita de "FONDAĴO IVO LAPENNA", redaktita de D-ro Klaus Perko, Aŭstrio.

Formato A5, broŝurita, 170-paĝa, verdkolora, glita kovrilo. Prezo: 175 d.kr. inkl. afranko.

Mendu ĝin ĉe la Libroservo de UEA (50,70 gld.) aŭ rekte ĉe "FONDAĴO IVO LAPENNA", kasisto: Peter Zacho, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio, pĉk.: København 1190601.



Por sensoifigi ĉiun literaturamanton:

poemoj
rakontoj
eseoj
antikvaj kaj novaj,
originalaj kaj tradukitaj,
simplaj kaj profundaj.

**Tra 10 jaroj *Fonto* akvumas
nian beletran kampon.
Ĉerpu vi el ĝi!**


Abonu pere de UEA (30 gld.)
aŭ rekte ĉe la eldonisto (US\$15):

Gersi Alfredo Bays

Caixa Postal 49, BR-89800 Chapecó-SC, Brazilo

TRAVIVU NUN EŬROPON DE LA JARO 2000 PER

ESPERANTOTUR-KARUSELVOJAĜOJ



Eblas aliĝi en kiu ajn el ĉi tiuj lokoj kaj plilongigi la vojaĝon, de unu aŭ pluraj semajnoj, ĝis la aliaj celoj preparolitaj en la "Turisma Kalendaro" de MONDA TURISMO.

Dum julio kaj aŭgusto kaj je paskaj libertempoj: specialaj tarifoj por infangrupoj de lernejoj kiuj havas Esperanton en sia programo, kaj por junuloj, pruvintaj skribi sian esperantistecon.

Info: ĉe ĉiuj delegitoj de MONDA TURISMO
aŭ ĉe

MONDA TURISMO	Schotlandstr. 73, B-1060 Bruselo
ESPERANTOTUR	ul. Skłodowskie-Curie 10/3 PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando

La Oomoto-Lernejo de Japanaj Tradiciaj Artoj

anoncas la 2-an Kulturan Seminarion por Esperantistoj.

Jen unika enkonduko al japana kulturo per lecionoj kiuj emfazas la efektivan praktikon de japanaj tradiciaj artoj, inkluzive de teceremonio, kaligrafio, flaranĝo, ceramiko kaj aliaj. Estas nenia postulo pri aĝo, sekso aŭ antaŭa eduko.

La anoncita seminario en 1989 bedaŭrinde ne okazis, ĉar pro diversaj kaŭzoj la anoncitaj interesatoj ne povis efektive ĉeesti en la seminario. Por faciligi partoprenon, ni ŝanĝis la datojn kaj draste malaltigis la prezon. Tion ni povas fari pro la malpli longa daŭro kaj malpli luksaj manĝoj.

datoj: 1990 aŭgusto 10-25

loko: Kameoka, Japanio

prezo (inkluzivas instruon, loĝon, manĝojn, ekskursojn ktp):
US\$300 por homoj el Suda Ameriko, orienta Eŭropo, Afriko
kaj Azio (escepte Japanion); **US\$500** por aliaj

informo kaj aliĝilo ĉe:

Internacia Fako, Oomoto, Kameoka-si, Kyoto-hu, 621 Japanio

Partopreno limiĝas al 8 personoj por ebligi individuan atenton.

"Ŝajnas, ke post tiuj intereseĝaj du semajnoj ni komencis kompreneti la japanan pensmanieron kaj la kaŭzojn de la japanaj sukcesoj." – Flóra Szabó-Felső, partopreninto en 1988

